

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Vera Barandovská-Frank

Duncan Charters

Chen Ji

Mireille Grosjean

Dennis Keefe

Zsófia Kóródy

Ilona Koutny

Katalin Kováts

Stefan MacGill

Radojica Petrović

Germain Pirlot

Yu Jianchao



ilei

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Stefan MACGILL: <i>Atingoplenan novan jaron por ni en ILEI!</i>	4
Duncan CHARTERS: <i>La Arto de Komunikado, Komunikado de Arto</i>	7
YU Jianchao: <i>Supera Eduko de Esperanto en Ĉinio</i>	11
Dennis KEEFE: <i>BEK-Kurso: Netradicia maniero por instrui la prefiksojn [...]</i>	18
Katalin KOVÁTS: <i>Panteono por niaj eminentaj pedagogoj</i>	23
Ilona KOUTNY: <i>Porinstruista ekzameno kaj kvina starto de nova [...]</i>	24
Zsófia KÓRÓDY: <i>GRUNDTVIG-projekto enkadre de la Dumviva Lernado [...]</i> ...	27
<i>Por via notlibro</i>	32
<i>Reago (Germain PIRLOT)</i>	35
<i>La Dua Komunikado de la 45-a Konferenco de ILEI (Radojica PETROVIĆ)</i>	36
<i>Informoj pri ILEI</i>	40

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MACGILL, Pannónia u. 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.

Tel. (+36 1) 349-5207, <stefan.macgill@gmail.com>. Kunordigo, eksteraj rilatoj, regularoj, partneroj, 'esperanto125', *Juna amiko*

Vicprez.: Duncan CHARTERS, PO Box 100, Elsah, Illinois 62028-0100, Usono.

Tel. (+1) 618 3745252, fakso: (+1) 618 3745465, <duncan.charters@gmail.com>.

Universitata kaj scienca agado/komisiono, instru-teknologia evoluo.

Sekretario: HUANG Yinbao (Trezoro), Jingchuan-Xian, Esperanto-box 16800#, Pingliang, Gansu, CN-744300, Ĉinio. Tel. (+86) 18893316800, <ilei.sekretario@gmail.com>, por membro-administrado: <ilei.oficejo@gmail.com>.

Estrarano pri financoj: Julija BATRAKOVA, Rusio/Hago, Nederlando.

Tel. (+31) 252 515331, <persiko@mail.ru>. Financaj kaj kasistaj aferoj.

Estrarano: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412

Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983,

<zsofia.korody@esperanto.de>. E-centroj, instrukapbligado, ekzamenoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak,

Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radojica.petrovic.rs@gmail.com>.

Edukprojektoj, konferencoj, informado, terminara komisiono.

Estrarano: Julián HERNÁNDEZ ANGULO, Arbol Seco 371B e/Clavel y Santo

Tomás, Centro Habana, Ciudad Habana, Tel. (+53) 6404484,

<julian@esperanto.co.cu>. Landa agado, komisiono pri lerneja agado.

Titolpaĝe: Studentino de la Artkolegio en popolokostumo de sia etno dum la bonveniga koncerto en Kunming (vd p.36). *Dorskovrile supre:* Dennis Keefe, la 'esperantisto de la jaro 2011' transprenas sian diplomon de Katalin Kováts sur E-Insulo en Ĉinio (lian artikolon vd sur p.18); *malsupre:* Arko, Radojica kaj Trigo dum interparolo kun la kolegiestro en Kunming (vd p.36)

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank,
Germanio, Universität Paderborn;
AIS²

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probab Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Wim Jansen, Nederlando,
Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iłona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяйственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Enkonduko

Karaj Legantoj,

pro hazardaj (eksterredakciaj) koincidoj, la nuna numero de IPR devas fermiĝi prokraste, pardonu...

Verkante la enkondukon, miaj pensoj estas profunde ambivalencaj. Unuflanke mi ĝojas pri la sukcesoj en Pollando, Germanio, Slovakio kaj Ĉinio, pri la sukcesa antaŭpreparo de nia 45-a Konferenco en Kunming kaj pri la valoraj fakaj artikoloj nun aperigitaj (jane mi petas pardonon de aŭtoroj, kies artikoloj povos aperi nur aprile); aliflanke mi malĝojas, ĉar dum 2011 ni perdis ĉ. 100 membrojn de ILEI, t.e. pli ol 10 %-ojn el niaj membroj. Reage al tio, kaj ILEI kaj ĝia organo IPR devas analizi sin mem, kiel eliri el tiu ĉi situacio. Unu eblo estas la ŝparado. Pri tio la komitatoj nun estas voĉdonantaj, kaj ĝi havos sekvojn ankaŭ por nia revuo (vd p. 6). Alia, pli oportuna eblo estas plibonigi nian laboron. Se temas pri IPR: ni atendas viajn konsilojn, en kiun direkton ni evoluigu ĝin por servi pli bone la interesojn de la legantaro. La komitatoj nun voĉdonos ankaŭ pri la Regularo de la Scienca Komitato, kiu helpas certigi la sciencon nivelon de IPR. Sed krom esti scienca, la revuo devas esti ankaŭ „interesa”. Ankaŭ por tio ni petas vian helpon.

Jozefo NÉMETH, redaktoro

Atingoplenan novan jaron por ni en ILEI !

Jam 2012! Tempo pritaksi 2011 kaj listigi defiojn por la lastaj ses monatoj de la mandato de la nuna ILEI-estraro. Jen okazo preni rigardon pli vaste ol la nuraj horizontoj de nia Ligo, por konstati, ke jam delonge ILEI fariĝis la dua ludanto sur la movada firmamento. Ni pri tio rajtas fieri – ĉar atingita per solida laboro kaj renovigaj streboj, sed samtempe ni devas duobligi niajn fortojn por digne plenumadi tiun rolon.

La novjara mesaĝo dissendita en la 31a de decembro 2011 resumis la atingojn de la lasta jaro; por IPR ni ne ripetu ilin; rigardu ilin en la enira paĝo de www.ilei.info. Nia nuna mesaĝo, pretigita – tre konvene – dum la ĉina novjaro, prefere rigardu antaŭen. Kion ni planas por la nova jaro?

- Intensigo de nia kunlaborada kaj gvida rolo en la preparoj por la 125-jara jubileo de Esperanto.
- Konkretigo de la kunlaboro kun IFEF pri komuna seminario en la fervojista kongreso en majo (vidu paĝon 33).
- Pretigo de modulara, fleksebla skemo por instruista trejnado, realigebla en plej diversaj lokoj, manieroj kaj cirkonstancoj.
- Orda transdono de la liga regado al nova estraro. Tiucele deko da gvidiloj estas verkitaj kaj afiŝitaj, kiel tria tavolo en la vico ‘Statuto-Regularo-Gvidilo’.
- Sukcesa realigo de la 45a Konferenco de ILEI en Kunming, kun bona partopren-nombro el diversaj kontinentoj, neforgeseblaj interkulturaj spertoj kaj valora programo. Tiucele nia respondeculo vizitis Ĉinion en novembro 2011, kaj abundaj informoj estas transdonitaj.
- Simila sukceso por la planata universitata simpozio, kiu povos eĉ atingi danajn nivelojn, dank’ al bonaj kontaktoj kun universitatoj en Kunming kaj Pekino.

Taskoj kaj defioj obstinas resti. Ni ne balau ilin subtapiŝen: serioza novjara mesaĝo devas ne nur saluti kaj bondeziri, skizi la tuj venontajn planojn, sed ankaŭ esplori niajn mankojn. Ni devas...

- Evoluigi la multlingvan retejon ĝis ni povos ĝin malfermi publike.
- Trovi novajn redaktorojn por pluivivigi la revuon *Juna amiko*, kaj trovi por ĝi varbiston.

- Eldoni serion de bazaj du-lingvaj varbiloj (E-o + alia lingvo) post trovo de monrimedoj por tio.
- Aperigi la rezultojn de la tre sukcesa simpozio, okazigita kadre de nia dana konferenco.
- Daŭrigi la renovigon de nia Statuto, por ke la Ligo povu pli konvene funkcii.
- Daŭrigi la delongan serĉon por ke iu prizorgu niajn eksterajn rilatojn kaj nian historion.
- Daŭrigi la provon akiri kontaktpersonon en Britio kaj Rusio por ke tiuj landoj revenu al ILEI.
- Preni kontakton kun aktivuloj en Irano por restarigi sekcion tie; maturigi la peton el Armenio.
- Aktivi kun Latinameriko, por akiri sekciojn en Argentino, Bolivio, Urugvajo, Nikaragvo...
- Starigi kontaktojn kun Vjetnamio, prepare al la UK tie kaj starigo de kurso antaŭ aŭ dum la UK.
- Labori plu por la nomumo de reprezentantoj en Mongolio, Indonezio, Nepalo, Vjetnamio.
- Meti la financadon de la laboroj sur finance subtenebla bazo sen ĉiujaraj deficitoj.
- Porti la naskiĝantan 'oficejon de ILEI' al plena funkciado, sur stabila ekonomia bazo.



Surfote: Bonveniga koncerto en Kunming honore al la konferenca laborgrupo de ILEI (vidu pli sur p.36)

Vi vidas, ke la subkuŝanta komunaĵo al ĉio tio estas niaj limigitaj laborfortoj kaj la malfacileco konvinki niajn membrojn kaj aliajn kontribui kaj kunlabori ĝuste kun ILEI ene de internacia kadro, kiam malfermiĝas ĉiam pli da projektoj kaj iniciatoj tra la mondo. Ni laŭeble kunlaboras kun

tiaj elpaŝoj, kiam iliaj celoj paralelas niajn. Sed la fakto restas, ke tia kreskanta plurismo limigas la laborfortojn kaj financajn rimedojn je la dispono de nia Ligo.

Kelkaj linioj pri niaj plej urĝaj taskoj tra la nuna monato: ni nun luktas fermi la membrajn kaj financajn finkalkulojn por 2011. Klare ni frontas signifan deficiton, eventuale iom malpli ol tiu buĝetita kaj akceptita. Spite ĉiajn laborojn, ni atendas konsternan falon en nia membreco je ĉ. 10% kompare kun 2010. Nia buĝeto 2012 jam trairis seson da iteracioj; eĉ post ĉiaj klopodoj, ĝi neniel povas eviti la refojan proponon de signifa defcito (ĉ. 7% de nia suma kapitalo). Agado kostas. Eĉ tiu nivelo estis atingita nur per fortranĉo de printempa estrarkunsido, triona reduktio en honorarioj por niaj aktivuloj kaj en repagoj de estraranaj kostoj, tranĉoj en la kostoj de niaj revuoj (atingota manko de aliaj solvoj, per malpliigo de la kolora presado) kaj rezigno pri ĉia eldona agado. Pri 2012, nia sekretario nun laboras organizi la subtenojn de la Koleghelpa Kaso; la jarfina kotizaltigo spronis signifan nombron da fruaj remembrigoj – ni laboregas dokumenti la rezulton de tio ene de januaro. Ni vivas en viglaj tempoj.

Ni tamen bonvenigu la novan jaron, sed tio ne eblas sen dankoj pri la pasinta, ĉar eĉ la eta ILEI dependas je la kombinitaj streboj de centoj da homoj por pluri. Mi dankas al la estraraj kolegoj, ni dankas al niaj sekciestroj, al komitatanoj pro iliaj pli aktivaj partoprenoj en nia decidado, al la LKK de nia 44a Konferenco en Kopenhago, al nia redaktoro de IPR, Jozefo NÉMETH – samtempe prizorganto de nia retejo, al la teamo de *Juna*



amiko, kaj precipe al nia demisianta redaktoro, Géza KURUCZ, al niaj partneroj, Katalin KOVÁTS (*edukado.net*), Ilona KOUTNY (UAM kaj instruista trejnado), la stabanoj de Kastelo Grésillon, la Esperanto-urbo Herzberg kaj amaso da aliaj, tro multaj por nomi individue.

Per tiuj pensoj, mi deziras al vi ĉiuj nome de ILEI prosperan kaj aktivan jaron en 2012! Estu la drako kun ni!

Stefan MACGILL
Prezidanto de ILEI

La Arto de Komunikado, Komunikado de Arto

de Duncan CHARTERS (Usono)

La pasintaj du jaroj atestis seriozajn diskutojn pri temoj gravaj por nia laboro kaj por la evoluo de la monda edukado. E-o jam montris, ke ĝi havas la rimedojn por fariĝi utila metodo atingi la celojn de la „Internacia Jaro por la Proksimigo de Kulturoj” (Kubo 2010), ĉar edukado per E-o kaj ĝia praktika aplikado nature kondukas al la deziro konatiĝi kun aliaj kulturoj kaj kompreni ilin pli bone kaj kun pli da akceptemo, kaj donas praktikajn okazojn por realigi tiujn celojn. En 2011, ni konsideris en Kopenhago la temon „Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado” kaj ni edukiĝis pri la diversaj rimedoj kiujn onikonsideras kaj praktikas por fronti la problemojn de lingva diverseco en edukado kaj la sciencoj, problemojn kiujn ne solvas ĉiam pli vasta uzado de la angla lingvo.



Ĉi-jare, la loko kaj la landa kulturo de la konferenco de ILEI donas al ni la eblon plilarĝigi nian kulturalan perspektivon por devigi nin konsideri ankaŭ aliajn supernaciajn komunikilojn kaj kulturajn transpontilojn. La komunikado mem estas arto, kiu sukcesas aŭ malsukcesas pro plej diversaj kialoj, inkluzive la trafan uzadon de la nuntempaj teknologiaj rimedoj. Tiuj rimedoj direktas kaj bildigas konceptojn kiuj antaŭe dependis de parolataj aŭ skribitaj vortoj, limigitaj al la apuda ĉeesto de la parolanto aŭ al enmanigita libro. Pro tio ke E-o mem estas baze lingvo, la uzantoj de tiu lingvo povas kredi ke komunikado okazas, kaj pliboniĝas, per elekto de la „ĝusta” lingvo-komunikilo kaj ĉiam pli efika uzado de la parole kaj skribe plej precizaj vortoj kadre de tiu lingvo. Vortoj ja prezentiĝas kiel la plej evidente kompreneblaj signifoportiloj de nia epoko, kaj oni povus kredi ke „komunikado” realiĝas precipe aŭ preskaŭ ekskluzive je la nivelo de ties kompetenta prezentado. Tamen ĉu komunikado okazas ekster la limiga kadro de vortoj? Edward HALL kaj aliaj antropologoj asertis ke ĝis 80% de la interhoma komunikado estas ekstervorta. Tion oni devas difini, tamen la aserto mem estas pensiga kaj alirebla diversmaniere. Nur por komenci,

kiom gravas la kinetiko aplikata al gestoj, gestolingvoj, la esprimiĝo de sentoj per mienoj, krioj, muziko, desegnoj, pentrado? Komunikado ne estas nur intelekta ekzerco.

Lastatempe aperis la filmo „La Artisto”, kiu gajnis tiom da atento kaj premioj, ke ĝi kandidatas por la kinoprodukto de la jaro. Kio ĝin karakterizas? La fakto ke ĝi tiel sukcese revenigas la spektantojn al la modo de la malnovaj „silentaj” filmoj, kiuj estis la solaj antaŭ ol la teknologio permesis la aldonon de la voĉoj de la geaktoroj. Ne nur per vortoj ni komprenas la rilatojn inter la homoj, inter hundo kaj ĝia mastro, la emociojn, la sentojn, la tragediojn kaj triumfojn de la homa vivo kaj de la homaj rilatoj kun siaj samhomoj kaj kun sia mondo. Jes, oni ŝpareme uzadis transskribadon de supozataj dialogpartoj, kio ĝenis per interrompado de la bildoj de la filmo, sed tio estis malgranda parto de la tuta arto komuniki sen parolado.

Muziko komunikas sentojn, ofte pli efike ol vortoj, harmoniante kun la reagoj de la publiko antaŭ la vidataj scenoj. Silento mem komunikis, rifuzante interpreti tion kio okazas surekrane por ke ĉiu individua spektanto devu pensi kaj senti por si mem. Tiel povis vekigi tute individue emocioj de ĝojo, timo, kompatado, vere aŭtentikaj homsentoj, kiuj povas esti ne nur interpretataj, sed aginstigataj kaj vivŝanĝataj. Kaj tio povis unuigi publikon kune alvenintan al la samaj emociaj konkludoj pri la spektitaj scenoj. Kino estas unu el la novaj artoj, kiu antaŭe devis resti senvorta (almenaŭ parole) sed neniam estis vere tiel silenta kiel oni povas supozi. Multajn tiajn filmojn akompanis konstante orgenmuziko aŭ eĉ tuta orkestro, kiel ĉiam pli popularas ĉe la loka simfoni-orkestro en nia apuda grandurbo Sankta-Luiso. Sed kio pri la pure senvorta arto (ankaŭ ne ĉiam silenta, ĉar ekzistas moderna arto moviĝanta, aŭ kun integritaj sonoj)?

Permesu al mi nun citi ekzemplojn el spertoj en mia propra lernejo Principia, kie edukiĝas lernejanoj de la infanĝardeno ĝis universitata nivelo.

En nia elementa lernejo, infanoj el tri lernejaroj partoprenas programon de interŝanĝado de arto kun lernejanoj loĝantaj en Latinameriko. La programon organizas „Creative Connections” (Kreemaj Konektoj), senprofitcela entrepreno pri kulturaj interŝanĝoj, fondita de Alan Steckler, diplomito de la du plej superaj niveloj de la lernejo. La lernejanoj kunlaboris kun siaj

ĉefinstruistoj kaj kun instruistoj pri arto por krei pentraĵojn, kiuj montru kiel vivas ĉiutage loĝantoj de Usono. Antaŭ la ĵus pasinta Kristnaska ferio-periodo, kopioj de la pentraĵoj estis afiŝitaj ekster la klasĉambroj, por ke ĉiuj preterpasantoj povu rigardi kaj prijuĝi la aŭtentikecon de la reprezentado de la usona vivo, kies originalojn la organiza entrepreno sendis al diversaj regionoj kaj landoj de Latinameriko. La lernejoj en Latinameriko dumtempe preparadis siajn artverkojn por sendado al aliaj landoj, inkluzive al tiuj samaj klasoj de Principia, kiuj kreis perspektivojn pri sia vivo por dividi ilin kun la latinamerikanoj. La grupoj sisteme studos la bildojn, kiujn ili reciproke sendis, kaj faros konkludojn pri la kulturo en kiu loĝas iliaj „geamikoj”, kun kiuj ili komunikigis tute senvorte. Baldaŭ en la printempo oni afiŝos la arton ricevitan apud la arto sendita, por ke la kontrastojn observu kaj prikomentu la lernejoj, instruistoj kaj administrantoj, la gepatroj de la lernejoj kaj aliaj vizitantoj al la lernejo.

Je universitata nivelo, kie mi laboras en la Kolegio, profesoro pri historio lastatempe eniris en la por li novan kampon de instruado de arthistorio. Kial? Parte pro tio, ke li kiel diplomato spertis la profundan efikon de la arto en la historio, politiko, regado kaj religio, samkiel ĝian rilaton al ĉiu el ili. La arto, same kiel la literaturo, povas esti efika armilo kontraŭ maljusteco kaj kruela konduto (*Guernica* de Picasso estu nur unu el multegaj ekzemploj), kaj efektive pli efika en la senco ke la mesaĝo povas komunikigi tuj ekde la unua ekvido kaj reago de la observanto. Arto povas ne nur pliriĉigi sed ankaŭ ŝanĝi kulturojn. Arto povas inspiri, plibeligi kaj plinoblighi la vivon, sed aliflanke ĝi uzeblas por vendi produktojn, primoki, atenci aŭ refortigi valorojn bonajn kaj malbonajn. Tiun profesoron pri interalie germana historio influis gastprofesorino el Germanio, d-rino Annette KREUTZIGER-HERR, fake konata pro siaj muzikologiaj kaj artaj kulturstudoj. Ŝi, en prelego al la universitata komunumo per unike kreivaj bildoj, substrekis kiom kaj kiel efike nuntempaj artistoj komunikas pri la problemoj de naturkonservado, tergloba varmiĝo kaj aliaj preme gravaj temoj kiuj rilatas al la kvalito de la homa vivo sur nia planedo. El la hodiaŭa arto ni povas sperti la nekredeblan belecon de la naturo, kiun ni ne povas persone viziti aŭ eĉ surloke ne povas plene enpreni en la konscion.

Tamen, kontraŭe kapablas ŝoki nin ofte intensaj kaj eĉ korŝiraj reprezentadoj de naturdetruado, ekzemple perfortado de la loĝejoj de senkulpaj bestoj, ofte ŝajne vane protektantaj siajn idojn kaj estontecon

kontraŭ atencoj kaj altrudoj de la tiel nomita civilizo kaj ĝiaj reprezentantoj kaj konsekvencoj. El tiaj bildoj observanto povas konkludi, ke necesas protesti kontraŭ agoj kiuj esence malplivalorigas la homajn dignon kaj idealojn. Artistoj do povas helpi al la homaro rekonektiĝi kun la naturo, deziri ĝin kompreni, konservi kaj glorigi. La arto povas leviĝi kontraŭ ekonomia kaj politika potenco, montri veron kiun ne volas akcepti diktatoroj, komercistoj, aŭ ĉiuj individuoj pli interesataj de propra profito aŭ memvanto. Pro tio ke la arto ne konas landlimojn, ĝi havas potencialon ĝis nun ne ekspluatitan por transponti kulturajn, lingvajn kaj sociajn barilojn. La arto, aŭ belarto en siaj diversaj formoj, povas devigi nin pli humile sinteni antaŭ nia evidenta nescio pri tio kio estas la naturo kaj ĝiaj bezonoj, kaj pri la kondiĉoj de niaj kunhomoj. Laste, la arto estas interspecia, ĉar ne necese limigita al la homaro, do malfermas pli vastajn perspektivojn kie la lingva komunikado ne sukcesus penetri.

Kolego kaj amiko mia, James Schmidt, emerita profesoro pri arto diversmedia, klarigis ke la arto ne nur estas nelimigita, sed ankaŭ neniam izolita. Dum la tuta kariero li interesiĝis pri la ĉiutaga aplikado de arto al la homa vivo, kio kondukis lin al studado pri teksaĵoj kaj kiel ili sukcesas plibeligi niajn vestaĵojn, hejmojn, artan senton kiel normala parto de la ĉirkaŭaĵo. Artisto povas trovi belecon en ĉio kio ĉirkaŭas, eĉ grandskale sen unu piedpaŝo. Tamen vojaĝado estas esenca parto de la vivo de artisto, ĉar ĉiam stimula: subite prezentiĝas tute malsamaj kulminaj kuniĝoj de teksaĵoj, formoj, pejzaĝoj kaj koloroj. Kiu vojaĝo aparte efikis sur lian perspektivon aŭ plej multe ŝanĝis ĝin? Efektive vojaĝo al Ĉinio. Kie la vasta uzado de vivplenaj koloroj kaj interesa kaligrafio aparte lin impresis, kaj spronis plurajn novajn artverkojn el liaj propraj metiloj. Kio memorigas pri Ĉinio, ke ekde la unuaj momentoj kiam ili lernas skribi, ĉinaj infanoj laboras kiel artistoj, tiel ke la arto profunde enradikiĝas en la ĉinan vivsperton kaj interpretadon de ilia mondo. Sen arto, ĉu ni havus historion, civilizon kaj la eblon sekvi ĝian evoluadon tra la jarcentoj? Kiel konkludis Prof. KREUTZIGER-HERR, sen arto la natursciencoj regus la mondon.

Ĉu dezirinda estonteco?

D-ro CHARTERS estas profesoro de la Katedro Cornelius Ayer kaj Muriel Prindle Wood pri humanismaj studoj en la universitato Principia College, Usono, kaj servas kiel vicprezidanto de ILEI.

Supera Eduko de Esperanto en Ĉinio

Esperanto-kursoj de Ĉina Komunika Universitato

(YU Jianchao, Kopenhago, julio 2011)

Somere de 2010 diplomiĝis 10 studentoj en la E-Fako de Fremdlingva Kolegio en Ĉina Komunika Universitato. Sep el ili eklaboris en la E-redakcioj de Ĉina Radio Internacia, El Popola Ĉinio kaj Ĉina E-Ligo. Tiu kurso estis jam la sesa, kiu kapabligis E-fakulojn por la menciitaj institucioj. Ĉina Komunika Universitato estas la sola supera lernejo, kiu establis la E-fakon jam antaŭ 60 jaroj.

Dum la pasinta duona jarcento, kvankam kelkfoje ŝanĝiĝis la nomo, tamen la lernejo (nun Ĉina Komunika Universitato) heredis la tradicion kapabligi E-fakulojn por nia afero. En la lastaj pli ol 50 jaroj eliris el la E-fako de la universitato ĉirkaŭ 60 studentoj, kiuj profesie laboras per E-o, iasence por E-o. Inter ili troviĝas meritoplena Dai Songen (forpasinta), elstaraj Tan Xiuzhu, Hang Jun (forpasinta) Yu Tao..., veteranaj Li Yuping, Wang Yuqin kaj freŝa Wang Shanshan...

En tiu ĉi raporto ni rigardu la historion, kiel la E-kursoj en la Fremdlingva Fakultato de Pekina Disaŭdiga Instituto disvolviĝis al la E-fako ene de la nuna Fremdlingva Kolegio de Ĉina Komunika Universitato.

I. Kial oni establis Esperanto-fakon en ĈKU?

La ĉina E-movado ludis gravan rolon en la ĉina historio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Esperanta laboro estis laŭdata de la registaro. En 1950 aperis la Esperanta revuo *El Popola Ĉinio*; en 1951 fondiĝis Ĉina E-Ligo; fine de 1964 ekfunkciis la E-elsendo de Radio Pekina (nun Ĉina Radio Internacia).

1. Kial Ĉinio starigis la E-fakon en Supera Lernejo

En sia libro *Memorando de Ĉina Esperanto-Ligo*, sinjoro Hou Zhiping (eksa direktoro de la revuo EPĈ) notis:

- La 11-an de marto 1951 fondiĝis la Ĉina Esperanto-Ligo en Pekino (tamen en 1953 ĉesis la funkciado de la Ligo).
- En majo 1956 sinjoro Hujucz (vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso) estis invitita viziti Moskvon kaj

Ĉeĥion. Dum la vizito li spertis la tieajn E-agadojn. Reveninte, li raportis al la ŝtata konsilantaro kaj petis refunkciigi la laborojn de ĈEL. Julie vicĉefministro Chen Yi faris instrukcion, ke ĈEL refunkciu.

- Januare 1957 ĈEL ĉiufacete revigliĝis, kaj decembre reaperis la revuo EPĈ.
- Julie 1962 la propaganda departemento aprobis, ke la Ligo estu sub la Komitato por la Laboroj de Fremdaj Lingvoj
- Julie 1963 Pekino okazigis ekspozicion pri E-o. La 25-an de julio inaŭguriĝis la unua tutlanda kunsido de E-o. Vicĉefministro Chen Yi faris parolon kaj laŭdis la Esperantajn laborojn. Aŭguste ĈEL proponis al la Eduka Ministerio, ke en iuj superaj lernejoj funkciu kurso de E-o. La propono estis akceptita.

2. Establo de Esperanto-fako

Fine de la 50-aj jaroj vicprezidanto de ĈEL sinjoro Ĵelezo, ĉefsekretario de la ligo Chen Yuan kaj kelkaj veteranoj faris provon de E-elsendo ĉe Radio Pekino (la nuna Ĉina Radio Internacia). En 1959 la radio komencis prepari E-elsendon. Sekve la fremdlingva fakultato de Pekina Disaŭdiga Instituto establis la E-fakon.

II. Skizo pri ĈKU kaj ĝia Esperanto-fako

Ĉina Komunika Universitato estas grava supera lernejo sub la Eduka Ministerio. Komence ĝi estis unu el la sekcioj de la Centra Disaŭdiga Buroo (fondita en 1954) por trejni radio-teknikistojn. Aprile de 1959, aprobite de la ŝtata konsilantaro, el la sekcio oni lanĉis Pekinan Disaŭdigan Instituton. Aŭguste 2004 ĝi ŝanĝis sian nomon en Ĉinan Komunikan Universitaton.

1. Esperanto-fako de ĈKU

En 1961 Pekina Disaŭdiga Instituto estis rajtigita por funkciigi E-kurson kun la celo klerigi fakulojn por Radio Pekino, kaj la unuaj du kursoj de E-o komenciĝis respektive en 1961 kaj 1962. La du kursoj estis por unu jaro kaj por unu jaro kaj duono. Entute estis 6 studentoj.

Oktobre 1964 Pekina Disaŭdiga Instituto venigis 20 studentojn el kvin universitatoj, respektive de Pekino, Ŝanhajo kaj Harbino, por la tria E-kurso. La studoperiodo estis unu jaro kaj duono. En 1989 venis la kvara

kurso, E-klaso kun 14 studentoj, kiuj lernis E-on du jarojn. En 2003 estis la kvina kurso kun 7 studentoj. Ankaŭ ili havis dujaran studoperiodon. En 2006 la sesaj kursanoj studis Esperanton kvar jarojn, kaj 12 studentoj aliĝis. Entute 59 studentoj inter 1961 kaj 2010.

2. Instruistoj

Pro la limigita aplikado de la lingvo, Pekina Disaŭdiga Instituto havas neniun lokon por E-instruisto. Frutempaj kursoj estis gvidataj de sinjoroj Venlo Fon, Zensto kaj Li Shijun (Laŭlum). En 1964 du diplomitoj, Hang Jun kaj Zhan Xuede, restis en la instituto kiel E-instruistoj. Tamen dum la dekjara kultura revolucio (1966-1976) ĉe la instituto ĉesis ĉiaj instruoj, kaj la du diplomitoj eklaboris en Radio Pekina.

De 1989 la instruistoj por la E-kurso de Pekina Disaŭdiga Instituto estis dungitaj ofte de ĈRI kaj EPĈ. Ili estis studentoj de la instituto, ekzemple Liu Junfang, Li Yuping, Xue Meixian, Zhang Haiping...

En 2003 sinjoro Li Weilun estis invitita kiel la ĉefinstruanto. Li venis el Ĉina Fremdlingva Universitato.

En 2006, en la kvarjara kurso, Tan Xiuzhu, Yu Jianchao, Liu Caisheng, Zhao Jianping kaj Hou Zhiping laŭfakte (intensiva legado, ampleksa legado, verkado, tradukado, parolo, aŭskulto, historio...) instruis la E-studentojn. (Inter ili Tan, Liu, Yu estis studentoj de la antaŭaj E-kursoj de Pekina Disaŭdiga Instituto.)

3. Lernoobjektoj

Por la unuaj du kursoj (1961, 1962) la lernoobjektoj estas relative simplaj; por la dujaraj kursoj, nome tiuj respektive en 1989 kaj 2003, aldoniĝis la lernoobjektoj pri komunikaj rimedoj kiel televido kaj fotado; por studentoj de la jaro 2006 la lernodaŭro duobliĝis, kaj pliriĉiĝis la enhavo de la lernoobjektoj.

4. Lernolibroj

Ne estis taŭgaj lernolibroj. Plej multaj lernolibroj estas kompilitaj de ĉinaj veteranoj, ekzemple de Venlo Fon, Li Shijun (Laŭlum) kaj Li Weilun. Ni uzis ankaŭ la librojn Paŝoj al plena posedo (de William Auld) kaj Faktoj kaj fantazioj (de Marjorie Boulton)... Krome, ni mem kompilis legaĵojn.

5. Praktikado

Studentoj povas fari praktikan laboron senpere en EPĈ kaj ĈRI, tamen mankas al ili la ŝanco lerni eksterlande. Ili faris interŝanĝojn kun

eksterlandaj esperantistoj per korespondado, tamen tre malofte ili renkontiĝis kun fremdlandaj samideanoj. Estas feliĉe, ke kursanoj en la periodo de 2003 ĝis 2005 spertis la pekinan UK-on en 2004.

III. Disvolviĝo kaj ŝanĝiĝo de Esperanto-fako

1. Esperanto-kurso kadre de Fakultato Fremdlingva

Estis tri kursoj kun 26 lernantoj respektive en 1961, 1962 kaj 1964:

– En 1961 tri studentoj el ĵurnalisma fako estis elektitaj por studi E-on, la studperiodo estis unu jaro.

– En 1962 tri studentoj, ankaŭ el ĵurnalisma fako, konsistigis la duan kurson kun studperiodo de unu jaro kaj duono.

– En 1964 dudek studentoj, plejparte el la ruslingva fako de kvin superaj lernejoj respektive de Pekino, Ŝanhajo kaj Harbino, konsistigis la trian kurson de Esperanto por dujara studperiodo

(Estas sciata, ke Ĉinio suferis de la 10-jara kultura revolucio de 1966 ĝis 1976. Ankaŭ Pekina Disaŭdiga Instituto suspendiĝis dum la 10 jaroj. La E-fako venigis neniun studenton ĝis 1989, kiam Ĉinio aktive prepariĝis por la 5-a Azi-Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao 1992).

2. Esperanto-fako sub Fakultato de Internacia Ĵurnalismo

En 1989 dek du studentoj kaj du (por plua studado el Qingdao) konsistigis la kvaran E-kurson kadre de fakultato de Internacia Ĵurnalismo de Pekina Disaŭdiga Instituto. La studentoj en la dua studjaro venis el fakultatoj respektive de ĵurnalismo, dramaturgio, televizio, elektronika inĝenierio, parolarto. Tiuj sin anoncis por lerni E-on en la postaj du jaroj de sia studado en Pekina Disaŭdiga Instituto. Ili lernis Esperanton du jarojn.

3. Esperanto-fako de Kolegio de Internacia Komunikado

En 2003, proponite de Ĉina Radio Internacia, Pekina Disaŭdiga Instituto ree funkciigis E-kurson sub la Kolegio de Internacia Komunikado, kaj 7 studentoj en la dua studjaro venis el aliaj fakoj. Feliĉe ili kaptis la ŝancon partopreni kiel volontuloj en la 89-a UK en Pekino 2004.

Ekde sia diplomiĝo, ili laboras respektive en EPĈ (1), ĈEL (1), ĈRI (4), kaj unu faris pluan studadon eksterlande.

En 2004 Pekina Disaŭdiga Instituto fariĝis Ĉina Komunika Universitato.

En 2006 Kolegio de Internacia Komunikado de ĈKU la sesan fojon funkciigis E-kurson. 12 junuloj elektis E-on kiel sian studfakon.

4. Esperanto-fako de Fremdlingva Kolegio

En 2008 la Kolegio de Internacia Komunikado ŝanĝis sian nomon en Fremdlingvan Kolegion. La studentoj de la jaro 2006 spertis la ŝanĝon.

IV. La apogilo de la Esperanto-fako

La kursoj de la E-fako apogas sin sur la lernoobjektoj de la universitato. Frutempe (ekde la komenco) la fremdlingva fakultato estis unu el la tri fakultatoj de Pekina Disaŭdiga Instituto.

En 1982, danke al la subteno de la ŝtataj koncernaj departementoj (propaganda, radia kaj televida, eduka) la fakultato ekzistis plejparte kiel departemento de internacia ĵurnalismo.



En 1999 fondiĝis la Kolegio de Internacia Komunikado surbaze de la Fremdlingva Fakultato, kaj poste ĝi fariĝis la Fremdlingva Kolegio en 2008, ĉar tiu titolo pli konformas al aliaj kolegioj de la Universitato. (Nun entute estas 18 kolegioj kaj 4 institutoj en la Ĉina Komunikativa Universitato). Komence de la 60-aj jaroj de la pasinta jarcento, la nova Ĉinio troviĝis en socialisma konstruo. Ĉio estis en burĝono. Studentoj dum la 60-aj jaroj havis la gravan taskon fari internacian komunikadon per E-o kaj disvolvi E-

movadon. Krom E-o, ili lernis ankaŭ ĵurnalismon, radio-teknikon, lingvistikon kaj aliajn. Relative simpla estis la studobjekto. La lernoperiodo estis mallonga, de 1 jaro ĝis 1 jaro kaj duono.

Studentoj de la jaro 1989 havis dujaran studperiodon. Kompare kun la antaŭaj, ili havis novajn studobjektojn, ekz. televidon kaj komputadon.

En la nova jarcento, al la studentoj necesas ellerni komputadon kaj posedi la anglan lingvon je certa grado (almenaŭ je la grado 6-a).

La 2003-ajaraj studentoj feliĉe partoprenis la 89-an UK en Ĉinio.

En 2006 la universitato unuafoje funkciigis kvarjaran kurson de E-o kaj studentoj estis sukcesintoj en ŝtata ekzameno. E-o kaj la angla lingvo estis ĉefaj studobjektoj. Krom duobla lernotempo kaj pliaj studoj rilataj al internacia komunikado, la studentoj havis ankaŭ la ŝancon elekti la duan fakon kaj per tio akiri la duan diplomon. Ili laŭplaĉe elektis akcesorajn fakajn objektojn kiel „redaktoro de radio kaj televido”, „ĵurnalismo”, „ciferecaj komunikaj rimedoj” „disaŭdiga kaj animatora arto” ktp.

V. Avantaĝoj kaj mankoj

1. Avantaĝoj

a) Laŭbezone kulturi fakulojn en supera lernejo estas efika metodo por kapabligi E-laborantojn. Teorie la kapabligitaj studentoj aktivu kiel kernaj fortoj de la Ĉina E-Movado.

b) Mallongtempa kapabligado evidentigas la avantaĝon de Esperanto, kiel tion elokvente pruvis la praktikeblo de nia lingvo.

c) La instruistoj dungitaj de EPĈ kaj Radio posedas praktikajn spertojn kaj pri studado (plejparte estis studentoj de la instituto) kaj pri la profesiaj laboroj. La instruado multe ligiĝas kun la laboro, tial la studentoj povas pli rapide al kutimiĝi al sia laboro.

2. Mankoj

a) Mankas taŭgaj lernolibroj: mi prenas la 2006-2010-an kurson kiel ekzemplon. En la komenco ni uzis la lernolibron „Moderna Esperanto” verkitan de sinjoro Li Weilun (invitita el Fremdlingva Universitato) por la intensiva legado, tamen rapide oni finlernis ĝin, tuj sekve ni prenis la libron de William Auld: Paŝoj al plena posedo. Inter la du estas granda distanco.

b) La instituto mem ne havas instruiston de Esperanto. Tio estas la manko de faka instruo.

c) Mankas iuj fak-lecionoj. Ekzemple, oni ne havis lecionojn pri E-historio inkluzive de la E-literaturo, kio estas nepra scio por veraj esperantistoj, precipe tiuj, kiuj profesie laboras per E-o. Por ne paroli pri esperantologio, lingvistiko kaj aliaj rilataj sciencoj.

Pri aliaj lecionoj kiel verkado kaj tradukado, nenia lernolibro taŭgas por niaj lernantoj. Mi elektis nur rilatajn artikolojn de famaj esperantistoj kiel Claude Piron, Ivo Lapenna, Edmond Privat kaj aliaj. Iam sinjoro Li Shijun (Laŭlum) kompilis la libron *Arto de Traduko*, el kiu mi post permeso elektis iujn ĉapitrojn por la lecionoj pri tradukado.

Ni invitis sinjoron Hou Zhiping lekcii pri la ĉina E-movado, sed neniu leciono pri historio de la monda E-movado, neniu leciono pri E-literaturo, neniu leciono pri lingvistiko aŭ gramatiko (Esperante) okazis.

d) Ne estis interŝanĝoj pri instruado (eĉ inter la engaĝitaj instruistoj malofte okazis interbabiloj pri la pedagogio).

e) La instruado ne estis tre bone aranĝita, ni povis nur sekvi la aranĝon de neesperanta fakulo de la kolegio.

f) Studentoj havis nenian ŝancon fari studan vojaĝon eksterlanden kaj tre malofte renkontiĝis kun alilandaj e-istoj.

VI. Konkludo

1. La espero de la UEA-prezidanto

En supera lernejo kulturado de fakuloj de specialaj lingvoj estas tradicio kaj efika rimedo. Ĉina Komunika Universitato kiel la sola supera lernejo de Ĉinio, kiu establis la E-fakon, metis solidan bazon por levi la ĝeneralan nivelon de la ĉina EM.

Fine de 2008 la prezidanto de UEA sinjoro Dasgupta vizitis Ĉinan Radion Internacian kaj prelegis en E-kurso (2006-2010) de ĈKU. Tio estis agrabla sperto por la studentoj. Poste li korespondis kun iuj el la studentoj. La 4-an de majo 2009, okaze de la 90-a datreveno de la Ĉina Movado de Studentoj, li sendis mesaĝon al ni: „*Tiun tagon en 1919 komenciĝis en Ĉinio granda socikultura renesanco, tradicie nomata „la movado de la kvara de majo”.* Ĉar la ĉinoj pretiĝis por tia procezo de tre longe (se ne nepre konscia), en nuraj kvar-kvin monatoj ili trafis profunde ŝanĝi la kulturen staton de sia socio. El tiu fermento naskiĝis (aŭ en iuj sektoroj, reliefiĝis kaj solidiĝis) ĉiuj elementoj en la moderna ĉina pejzaĝo – inkluzive de la fortika Esperanta vizaĝo de tiu unika civilizo. Hodiaŭ ni festas la 90-an datrevenon, do rondciferan, de tiu tute unika evento en la moderna

historio. Mi volas kunfesti ĝin kun vi ĉiuj. Mi tre esperas, ke per ĉi tiuj vortoj mi akcelas la procezon de pretiĝo por tio, ke post dek jaroj estu eble, ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ inter ĉiuj historie konsciaj esperantistoj, en la fermo de solenaĵoj inde festi la centjariĝon de tiu kultura renesanco”.

2. Perspektivo

Laboras nun en ĈRI kaj EPĈ esperantisto-fakuloj plejparte el ĈKU. El la historio de la E-eduko en tiu lernejo, ni konkludas, ke supera eduko de E-o en Ĉinio sendube estas sukcesa. La frutempa kultura celo ŝajnis simpla, sed la nuna direktas sin al kulturado de specialistoj interfakaj.

Ekzistas ankoraŭ mankoj en E-eduko en superaj lernejoj de Ĉinio. Rilate al la fako sub ĈKU, ĝia E-instrua programo ne estas tiel profesia, aperas iuj eraraj terminoj; mankas taŭgaj lernolibroj; ankoraŭ ne kompletigas la eduka programo...

En 2007 mi estis komisiita de ĈKU por ellabori projekton pri la establo de la E-fako. Konforme al la universitato, mi faris jenan esprimon laŭ la faka destino:

„La E-fako sekvas la principon de la universitato por la specialaj lingvoj: ke la fako estu distinga, kaj ĉiam progresu kun la epoko, ke la studentoj estu kompetentaj kun internacia vidkampo.”

Tio eble estas panorama perspektivo. Ĉar en la lernejo mem mankas instruistoj de E-o. Se temas pri la efektivigo, la projekto restas nur ideo. Finfine E-o estas lingvo, kvankam artefarita. Kaj oni elmetis, ke la lingvo-scienca estas teorio super ĉiuj sciencoj. Ĝi devas esti inter-, trans-, superkaj mult-scienca. E-o, kiel scienco mem estas ĉioampleksa krom kun lingvistika signifo kaj ĝi devas sciigi ankaŭ pri la movado.

BEK-Kurso: Netradicia maniero por instrui la prefiksojn kaj sufiksojn de Esperanto

RESUMO: Estas multe da manieroj instrui aŭ lerni la prefiksojn kaj sufiksojn de Esperanto. La BEK-kurso sekvas eble unikan vojon kiel vidiĝas el tio, ke BEK ne prezentas afiksojn antaŭ ol la relative flua parolado de la gelernantoj. BEK ne instruas la afiksojn dum klasĉambra periodo: la gelernantoj lernas ilin per la speciala libro NESPO kaj per dulingvaj vortaroj kaj aliaj lerniloj. BEK tamen jes ja kvizas kaj testas la gelernantojn pri afiksoj.

Kiel kelkaj legantoj de Internacia Pedagogia Revuo scias, la BEK-Kurso (**B**aza **E**speranta **K**ursaro, ankaŭ nomata **B**aza **E**Kzercaro) malsimilas de tradiciaj kursoj laŭ pluraj vidpunktoj: BEK estas tre longa, ĝis 100 horoj en la kurso de Eŭropo kaj pli ol 200 en tiu de Azio. Krome, ĝis 90 elcentoj de la lecionotempo de BEK estas praktikado, kaj tiu praktikado okazas plejparte sendepende de la kursgvidanto. BEK ofte instruiĝas en tre intensaj kursoj (Hispanujo, Francujo kaj Ĉinujo), en kiuj la materialo prezentiĝas ok horojn ĉiutage, multe pli ol en tradiciaj kursoj. Kaj tiu listo de malsimilaĵoj povas plilongiĝi, sed permesu al mi en ĉi tiu artikoleto prezenti unu trajton de BEK, kiu certe kontraŭstaras longdaŭran tradicion de la E-instruado: tiun de la prezentado de la sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj.

Kutime, dum bazkurso de Esperanto, la instruado de la prefiksoj kaj sufiksoj okupas centran rolon en la instrumaterialo. Ofte la instruisto prezentas kaj klarigas, ekde la unua aŭ dua lecionoj kelkajn simplajn afiksojn kiel MAL, IN, GE, IL kaj similajn. Se la bazkurso estas mallonga, ni diru, ekzemple, 12 semajnojn kun tri horoj ĉiusemajne, kelkaj instruistoj prezentas du aŭ tri afiksojn dum ĉiu leciono. Ofte la kriterio por la instruado de tiuj lingveroj estas simpleco, utileco kaj ofteco. Do se MAL kaj IL troviĝas en la unuaj lecionoj, afiksoj kiel ESTR kaj IND enmetiĝas pli poste, kaj finfine aperas la maloftaj afiksoj kiel END kaj ING.

Multaj instruistoj prezentas tiajn lingverojn per tradukado. Aliaj provas utiligi la rektan metodon, kaj, kiel vidiĝas en la Metodo de Cseh, eblas al la instruanto, per lerta prezentado, pli-malpli sukcese instrui afiksojn sen tradukado. Tamen en la plejparto de tiuj kursoj, ĉu tradukaj ĉu rektaj, la fakto restas, ke ANTAŬ OL la lernanto komencas flue paroli kaj bone aŭskulti, tiu lernanto studas kaj lernas preskaŭ ĉiujn prefiksojn kaj sufiksojn. En la BEK-Kurso, tute ne okazas tiel. En BEK, la lernanto lernas unue bone paroli kaj aŭskulti, kaj nur post tiu momento komencas lerni la sistemon pri afiksoj. Krome, tiu lernado plejparte okazas ekster la leciono, ne dume.

Tipa ne-BEKa, enkonduka bazkurso de Esperanto povas daŭri inter 20 kaj 40 horojn. BEK-Kurso daŭras multe pli da tempo, inter 60 kaj 100 horojn en Eŭropo, kaj ĉirkaŭ 200 horojn por ĉinoj, ekzemple. En la unuaj 50 horoj de la BEK-Kurso, mi eĉ ne mencias prefiksojn aŭ sufiksojn. Oni povas diri, ke la BEK-Kurso listiĝas inter la plej MALRAPIDAJ kursoj en la historio de E-o. La lernado de la afikso-sistemo de E-o okazas nur de kiam la

gelernantoj jam kapablas paroli la lingvon en pli komunika maniero, kaj tiu momento en Eŭropo povas esti post 30 horoj da instruado, kaj en Ĉinio post 100 horoj. Estas post tiuj momentoj, ke la lernado de la afiksoj komenciĝas.

Sed, kiel konkrete okazas la lernado de la prefiksoj kaj sufiksoj dum la BEK-Kurso? Ni diru, ke tiu lernado okazas plejparte ekster la klasĉambra laboro. La gelernantoj studas la afiksojn hejme, kaj ne enklasĉambre. Ili lernas, per dulingva vortaro aŭ aliaj lerniloj, ke MAL signifas KONTRAŬON; ARO signifas GRUPON, ERO signifas PECON; kaj ILO signifas INSTRUMENTON, ekzemple. Aŭ eble ili lernas la afiksojn per www.lernu.net kaj sekvas la klarigojn tie. Aŭ ili lernas per la libro POŜAMIKO, kaj tiel plu.

Post tiu ekvido kaj ekkompreno de la signifoj de la afiksoj, la BEK-anoj utiligas la libron NESPO, la Nova Ekzercaro pri Sufiksoj kaj Prefiksoj, kiu aĉetebblas ĉe Esperantaj libroservoj, aŭ senpage elŝuteblas ĉe la retejo www.bekkurso.info.

Ĝenerale NESPO organiziĝas laŭ la afiksoj. Ekzemple, estas unue la prefikso MAL, sekvata de multaj ekzemploj kiel MALGRANDA, MAL-LONGA, MALPEZA ktp. Due, estas ekzercaro kun kompletaj frazoj kaj spacoj por tiu prefikso MAL. Ekzemple: Elefanto estas g_____. Abeloj kaj formikoj estas M G_____. Tie la lernanto skribas GRANDA, MALGRANDAJ. Ĉiuj respondoj, entute pli ol 2000, troviĝas ĉe la fino de la libro. Poste, en la sekvaj paĝoj, aliaj afiksoj estas prezentataj sammaniere, kaj post la prezentado de la afiksoj kaj la ekzercoj, estas speciala ekzercaro, kvizo, en kiu ĉiuj jam lernitaj afiksoj estas utiligataj.

Unu el la ĉefaj trajtoj de la BEK-Kurso estas ĝia tre ofta ekzamenado kaj kvizado. Gelernantoj ĉiutage ricevas ekzameneton pri gramatiko, pri vortoj, kaj pri aliaj aferoj. Do, dum mi ne rekte instruas la afiksojn kaj la gelernantoj memlernas ilin ekster la klasĉambro, mi jes ja donas al la gelernantoj oftajn kvizojn pri tiuj afiksoj.

Laŭ mi, tiuj kvizoj estas prikonsiderindaj kontribuoj al la lernado kaj al la testado de E-o. Mi komencis utiligi ilin en la fruaj okdekaj jaroj, kiam mi instruis E-on en Madrido en Hispanio. Ili valoras por kromrolo en ĉiaj kursoj, kaj ili speciale servas por la racia ekzamenado de tiu parto de la Esperanta gramatiko. Ni rigardu ekzemplon de ili:

Antaŭ ĉio, sciu ke en la kvizoj pri afiksoj, oni tute evitas utiligon de naciaj lingvoj. Pro tio, la kvizoj povas esti utiligataj por lernantoj en ĉiaj kursoj tra

ĉiuj landoj. Ĉiu kvizo havas 25 erojn, kiuj konsistas el frazeto, substrekitaj vorto kaj spaco por la respondo. La lernanto vidas mallongan frazon en E-o, kaj devas traduki tiun frazon el E-o en E-on. La respondo konsistas el la substrekitaj vorto kun afikso. Ni rigardu kelkajn ekzemplojn el la unuaj ekzercoj de NESPO:

tre malgranda domo = _____
 tute ne alta = _____
pluvi tre malmulte = _____
patro kaj patrino = _____
 inaj hundoj = _____

La respondoj de tiuj itemoj estas *dometo, malalta, pluveti, gepatroj kaj hundinoj*.

Tiuj unuaj kvizoj de NESPO estas relative simplaj kaj inkluzivas malmulte da afiksoj. Iom post iom la kvanto da afiksoj kreskas kaj en la lasta duono de NESPO troviĝas kvizoj pri preskaŭ ĉiuj afiksoj, do la lastaj ekzercoj estas multe pli malfacilaj ol la unuaj.

Sekvas ekzemploj, el la libro NESPO, kiujn vi povas trovi sur la retejo de www.bekkurso.info. La unua ekzemplo (paĝo 26) montras la liston de la vortoj por la sufikso EJ, kaj la frazojn (entute 17) kun blankoj por kontroli la sciojn de la lernanto. La dua ekzemplo estas kvizo kun 25 eroj, kaj ĝi troviĝas en la lasta parto de la libro (paĝo 104). Respondoj troviĝas en la libro, ĉe la fino.

BEKkurso Vortstudo 15: Sufikso –EJ

ĉevalo	kino	malsanulo	preĝi
ĉevalejo	kinejo	malsanulejo	preĝejo
dormi	kuiro	manĝi	reto
dormejo	kuirejo	manĝejo	retejo
duŝi	lerni	naĝi	ttt
duŝejo	lernejo	naĝejo	tttejo
halti	loĝi	necesa	trinki
haltejo	loĝejo	necesejo	trinkejo
kafo	malliber	ofico	vendi
kafejo	malliberejo	oficejo	vendejo

EKZERCO 15: utiligu vortojn kun la sufikso -ejo.

1. Li estas ŝtelisto, sed la policianoj kaptis lin. Nun li estas en la m _____.
2. Estas lunde matene. La geknaboj estas en la l _____.
3. La familianoj dormas en la domo, kaj la hundo en la h _____.
4. – Ĉu vi deziras vidi filmon?
– Jes, ni iru al la k _____.
5. Estas dimanĉe matene. La kristanoj iras al la diservo en la p _____.
6. La kokino estas en la forno. La forno estas en la k _____.
7. Apartamentoj kaj domoj estas l _____.
8. Ĉu vi deziras trinki kafon aŭ teon? Se jes, ni iru al la t _____.
9. Ĉu vi deziras manĝi sandviĉon kun fromaĝo kaj ŝinko? Do, ni iru al la m _____.
10. Henriko iras al la lernejo. Li atendas la buson. Li estas ĉe la h _____.
11. La patro de Henriko nun laboras. Li estas bankisto. Li estas nun en la o _____.
12. Matene mi lavas min en la d _____.
13. La pastro iris en la p _____ por la dimanĉa diservo.
14. La ambulanco alportis la viktimon de la akcidento al la m _____.
15. La instruisto kaj instruistino restas la tutan tagon en la l _____.
16. En la k _____ cent personoj spektis la filmon.
17. La t _____ de Universala Esperanto Asocio troviĝas ĉe www.uea.org.

BEKumaĵoj – RESTUDO – pri afiksoj XXXII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end, bo, eks

1. _____ = kvalito de io utila
2. _____ = stato de fianĉino
3. _____ = io malglata
4. _____ = longa, kontinua dormo
5. _____ = prahistoria arbaro
6. _____ = ne supre, sed _____
7. _____ = kursanino kaj kursano
8. _____ = Tiu reĝo abdikis.
9. _____ = malbonodora parfumo
10. _____ = iomete bela

11. _____ = freneza persono
12. _____ = ŝuoj kun truoj
13. _____ = tre alta kaj larĝa pordo
14. _____ = returne pagi ŝuldon
15. _____ = fuŝe traduki
16. _____ = komence soni
17. _____ = vastigi ĉien
18. _____ = Tio meritas kredon. Ĝi estas _____.
19. _____ = altaj montoj
20. _____ = Oni devas lerni tiun lecionon. Ĝi estas _____.
21. _____ = Ramono helpas ĉiujn. Li estas _____.
22. _____ = Sofia observas tre bone ĉion. Ŝi estas _____.
23. _____ = Oni ne povas penetri tiun lokon. Ĝi ne estas _____.
24. _____ = Sur tiu planto kreskas rozoj.
25. _____ = Ni parolas ĉe tiu parto de telefono.

Dennis KEEFE, Universitato de Nankino, Ĉinujo

Panteono por niaj eminentaj pedagogoj

Edukado.net, la porinstruista paĝaro en decembro 2011 la duan fojon enirigis en sian Panteonon dekon da vivantaj pedagogoj.

La koncerna sekcio de la paĝaro celas kolekti informojn kaj prezenti la vivresumon de tiuj E-pedagogoj, kiuj multon faris por la instruado kaj disvastigo de la internacia lingvo, ĉu per rekta surpodia laboro, ĉu per verkado de lerniloj aŭ trejnado de E-instruistoj.

En la Panteono troviĝas jam prezentoj de sepdeko da historiaj, jam forpasintaj instruistoj, inter ili Andreo Cseh, Tiberio Morariu, Lidia Zamenhof, Henriko Seppik, István Szerdahelyi, Edward Symoens, Cathy Schulze, Zsuzsa Barcsay kaj de multaj aliaj.

La Panteono de *edukado.net* iusence tamen estas nekutima templo de granduloj. Okaze de la Zamenhofa tago, kiu ne hazarde estas ankaŭ la lanĉotago de la paĝaro, la redaktoro Katalin Kovats ĉiujare distingas ankaŭ 10-15 vivantajn esperantistojn, kiuj per siaj multflankaj kaj valoraj agadoj meritas jam dumvive okupi sian lokon inter la senmortuloj.

Ĝenerale por la Panteono la distingitoj mem verkas pri si mem prezenton, kaj tiel la legantoj el unua mano povas legi foje tre modestajn, foje detalan vivresumojn. Fine de la unuopaj paĝoj por ĉiu prezentito eblas lasi personajn dankvortojn kaj mesaĝojn, aŭ dividi memoraĵojn pri komunaj kaj rilataj eventoj.

En 2010 estis premiitaj 24 kolegoj: Detlev Blanke (DE), Marjorie Boulton (GB), Renato Corsetti (IT), Carla De Lorenzi (IT), Lars Forsman (SE), Helmar Gunter Frank (DE), Claude Gacond (CH), Will van Ganswijk (NL), Ronald Glossop (US), Ursula Grattapaglia (DE), Giuseppe Grattapaglia (IT/BR), Paul Gubbins (GB), Marta Eugenia Alonso Gutiérrez (CU), Mila van der Horst-Kolińska (PL/NL), Dennis Keefe (US/CN), Zsófia Kóródy (HU/DE), Ilona Koutny (HU/PL), Stefan MacGill (NZ/HU), Stano Marček (SK), Sophia Mensen (NL), Rob Moerbeek (NL), Luigia Oberrauch Madella (IT), Pedro Fernández Rodríguez (CU), Zlatko Tišljar (HR/SI).

En 2011 la sekvaj 10 kolegoj estis prezentataj: Jorma Ahomäki (FI), Hans Bakker (NL), Ewa Bondar (PL), Éva Farkas-Tatár (HU), Tereza Kapista (RS), Boris Kolker (RU/US), Géza Kurucz (HU), Maria Majerczak (PL), Luis Jorge Santos Morales (CO), Irena Szanser (PL).

Kompreneble kaj bonŝance la laŭmeritaj listoj kaj de la jam forpasintoj kaj de la vivaj distingitoj povus esti multe pli longaj kaj multe pli internaciaj. Nia redakcejo en la koncerna parto de la FORUMO atendas proponojn de la esperantistoj, kaj petas ankaŭ konkretajn kontribuojn. Ni kore gratulas al ĉiuj premiitoj kaj invitas la legantojn de IPR viziti kaj kontribui al la koncerna sekcio (<http://edukado.net/biblioteko/panteono>).

Katalin KOVÁTS, redaktoro de www.edukado.net

Porinstruista ekzameno kaj kvina starto de nova universitata grupo ĉe la Interlingvistikaj Studoj de UAM, en Poznano

de Ilona KOUTNY (Pollando/Hungario)

Dum la septembra interlingvistika sesio (17-23.09.2011) en la Universitato Adam Mickiewicz okazis **ekzamenoj** de 10 partoprenantoj de la unujara **instruista trejnado**, kiu estas komuna entrepreno de la Interlingvistikaj

Studoj de UAM kaj de ILEI kun la kontribuo de *edukado.net*. Post unujara serioza laboro (kun du surlokaj sesioj en UAM) la entuziasma internacia grupo (Magdalena Feifičová (SK), Ildikó Joóné Ladányi (HU), Gisela Macioszek (DE), Arlette kaj Edmond Plutniak (FR), Gizela Sklorz (PL), Svetlana Smetanina (RU), Petra Smidéliusz (HU), Margaretha Symoens (BE) kaj Szabolcs Szilva (HU)) prezentis siajn finlaboraĵojn kaj ekzamenigis pri gramatiko, literaturo kaj movado de E-o por akiri la instrurajtigon de ILEI. Pluraj analizis lernmaterialojn kun la gvido de d-rino Katalin Kováts. Flanke de ILEI partoprenis la ekzamenojn ankaŭ Zsófia Kóródy. La laboraĵoj estas konsulteblaj ĉe *edukado.net*.



De maldekstre: Marija Jerković, Ilona Koutny kaj Tea Radovanović

Kvar gestudentoj de la interlingvistika fako finis siajn 3-jaran studadon per defendo de siaj finlaboraĵoj kaj respondoj al la demandoj de la ekzamenkomisiono: du kroatinoj Marija Jerković (*kroataj lernolibroj de Esperanto kaj iliaj verkistoj*) kaj Tea Radovanović (*tradukita kroata literaturo al Esperanto*), Sean Healy el Usono (*maŝina tradukado kaj Esperanto*) kaj

Petro Balaž el Slovakio (*moderna informado kaj DVD kreita ĉe E@I*) – ĉiuj stipendiitoj de ESF.

La 5-an fojon komencis sian 3-jaran studon nova grupo ĉe la **Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj** de UAM la 17-an de septembro. La partoprenantojn el 10 landoj salutis la vicdekano de la Novfilologia Fakultato, prof. Jerzy Kaliszan. Li emfazis la unikecon de la interlingvistikaj studoj, jam bone instaligintaj en la Novfilologia Fakultato kaj la ĝojon, ke ĝi altiras partoprenantojn el multaj landoj. La gvidantino de la Studoj, prof. Ilona Koutny bonvenigis la partoprenantojn skizante la 13-jaran historion de la Studoj kaj la sekvantajn kursojn kaj taskojn. La studoj povis starti danke al stipendioj de ESF kaj de ILEI/UEA, kaj al la entuziasmo de la partoprenantoj, speciale de la brazila grupo. La 20 kursanoj (5 el Brazilo, po 3 el Hungario, Pollando kaj Svislando, po unu el Francio, Germanio, Italio, Hispanio, Rusio kaj Usono) konsistas plejparte el junuloj, sed ne mankas spertaj esperantistoj (Mireille Grosjean, gvidantino de la Ekzamena Komisiono de ILEI kaj Stefano Keller, estrarano de UEA).

Ili povis partopreni en 4 intensaj kursoj: – prof. John Wells prezentis kun vervo diversajn sonsistemojn en la mondo kaj pli detale la *fonetikon de Esperanto*; – prof. Vera Barandovská-Frank traktis *interlingvistikon*: de la tereno de interlingvistiko kaj internacia lingvosituacio tra la etnaj interlingvoj kaj piĝinoj ĝis planlingvoj; – prof. Aleksander Melnikov analizis la nocion kulturo kaj speciale la terenojn de *E-kulturo* kaj la fonajn sciojn de tipa esperantisto; – Lidia Liĝeža pliproksimigis la poezion kaj Tomasz Chmielik la prozon de la *unua periodo de la esperanta literaturo* al la ĉeestantoj. Ne mankis diskutoj kaj reagoj.

Dua Interlingvistika Simpozio en UAM

La interlingvistikan sesion sekvis **Interlingvistika Simpozio** (22-23.09. 2011) „*Interlingvistiko kaj esperantologio antaŭ la defioj de la 21-a jarcento*“, same en la Novfilologia Fakultato, organizita la 2-an fojon (la antaŭa okazis dum la dekjariĝo de la Studoj en 2008). Aliĝis al ĝi kvindeko da partoprenantoj el 15 landoj: inter ili novaj kaj malnovaj gestudentoj kaj instruistoj de la interlingvistika fako. Okaze de la malfermo kaj la vicdekano de la Novfilologia Fakultato kaj la vicdirektoro de la Lingvistika Instituto emfazis la gravan kaj prestiĝan rolon de interlingvistiko en la scienca vivo de la fakultato, dankis pro la organiza laboro la iniciatinton kaj gvidanton de la Interlingvistikaj Studoj, prof. Ilona Koutny, kaj deziris

fruktodonan konferencon. La dudeko da prelegoj okazis en 4 sekcioj: *lingvistiko, metodiko, movado kaj literaturo*. Fine de ĉiuj sekcioj okazis diskutoj pri la defioj al la donita tereno. Kelkaj ekzemploj el la programo: translingvigi kulturajojn en E-on (A. Melnikov), Globish (M. Farris), ekstermovadaj kunlaborebloj (Zs. Kóródy), RITE: Reta Instruista Trejnado ĉe *edukado.net* (K. Kováts), lingvopolitiko de UEA ĉe UN (S. Keller), atendoj de la esperantistaro por UEA (Z. Galor), la E-a literaturo sojle de la 21-a jarcento – kien, kiel kaj por kiu? (T. Chmielik). Programo ĉe <http://edukado.net/upload/enhavo/dosieroj/anoncoj/Interlingvistika%20Simpozio-1.pdf>.

La jaŭda bankedo pasis en tre bona etoso. La dekanino de la Novfilologia Fakultato ĉeestis kaj diris kelkajn favorajn vortojn pri la Interlingvistikaj fako kaj simpozio. Kiel kutime – la tuton finis la kultura aranĝo **Arkones** semajnfine kun aldonaj prelegoj, spektakloj kaj koncertoj. Tiel la gestudentoj povis ekkoni ankaŭ la polan esperantistan medion kaj agrable malstreĉiĝi.

Menciindas ankaŭ du gravaj eventoj, kiuj firmigas la lokon de interlingvistiko en UAM: la nomumo de Ilona Koutny (gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj kaj de la Ugrofinna Katedro) kiel profesoro kaj ŝia premiado pro la multjara organiza kaj didaktika laboro en la interlingvistika fako (intervjuo en la Pola Retradio: <http://retradio.posterous.com/> – 30.09.2011).

Dujara, trilandana modela kunlaboro

GRUNDTVIG-projekto enkadre de la Dumviva Lernado Programo de Eŭropa Unio

Partnera Projekto 2009 – 2011 kun la titolo: La plej rekta vojo al aktivigo de la popolo 55+ pere de speciala eduka programo

de Zsófia KÓRÓDY (Germanio/Hungario)

1) Enkonduko

La subteno al diversaj klerigcelgrupoj estas grava tasko en la tuta Eŭropo. La dana pastoro Nikolai Frederik Severin Grundtvig estas kvazaŭ la

inventinto de la klerigado por la t.n. „plenkreskuloj”. La fama eŭropa klerigoprogramo por plenkreskuloj ricevis la nomon de la dana pastoro kaj pioniro por plenkreskula klerigado, nome GRUNDTVIG.

Ankaŭ plenkreskuloj, do la pli aĝa generacio (en eŭropaj socioj eĉ kun pli longa vivdaŭro ol en la antaŭaj jardekoj), havas laŭleĝan rajton je klerigado, kvankam tio ĝenerale estas iom neglektata. Ĝuste pro tio estas grave, ke ekzistas EU-buĝeto por disdoni relative altajn subvenciojn por projektoj, kiuj sukcesas atingi la agnoskon de la specialaj naciaj klerig-agentejoj.

Tio estis por ni, projektpartneroj el Pollando (Pola Esperanto-Asocio), Germanio (Interkultura Centro Herzberg, ICH) kaj Slovakio (E@I), bona kialo okupiĝi pri projekto por la pli aĝa generacio. La prezidintino de PEA Halina Komar trovis multajn homojn el la aĝgrupo 55+ por komuna projekto. Ŝi trovis kaj spertajn esperantistojn kaj novajn el la propra hejmloko, kiuj volis lerni la komunan pontlingvon E-o samtempe kun novaj geamikoj el Slovakio kaj Germanio. La kunlaboro komenciĝis en aŭtuno 2009 kaj ni ĉiuj konsideras ĝin plensukcesa. Do, nun ĝi havas veran modelkarakteron kaj utiligante niajn spertojn kaj konsilojn, oni povas ellabori projektojn laŭ la sama metodo en aliaj lokoj kaj landoj.

La unua paŝo estis planado, la preparolado de fareblaĵoj el la baza ideo: ni instruu E-on al aktivaj maljunuloj, kiuj havas tempon ekz. post la pensiigo kaj ŝatus, povus lerni ne nur la lingvon sed ankaŭ tion, kiel ili poste mem fariĝu multobligantoj, klerigantoj, kursgvidantoj, organizantoj de klubkunvenoj. Aldone al tiu instrukapabligo estis la celo trejni la 55+ kursanojn pri uzado de komputilo kaj utiligo de interreto por memlernado kaj klerigceloj.

En januaro 2009 Halina Komar vizitis Interkulturan Centron Herzberg en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo por ellabori la projekton kun Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, kiuj jam ekhavis sperton pri tio per la Comenius-projekto por lernejoj. Kiel la tria partnero aliĝis el Slovakio E@I, sed malgraŭ la klopodoj bedaŭrinde neniu asocio, institucio troviĝis el Hungario kiel kvara partnero. Grava celgrupo de la projekto estis partoprenantoj en la studoj de la t.n. Universitato de la Tria Aĝo kaj ni celis – kaj sukcesis! – ricevi eŭropan subvencion por ebligi al la kursanoj vizitojn al la partnerlandoj kaj partoprenon en klerigsesioj, seminarioj, kulturaj kaj turismaj programoj.

2) La komenco

La unua paŝo estis organizi komunan trejneblon por la internacia kursanaro kaj zorgi pri lingva perfektigo kaj samtempe pri la bezonataj movadaj respektive metodikaj konoj. La tutsemajna kurso dum Torpedo-5 inter 9-16 oktobro 2009 en **Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Germanio** donis la bezonatan lingvan, fakan kaj metodikan trejnadon kaj enhavis ankaŭ studojn pri gramatiko, interlingvistiko, literaturo, movadhistorio, Esperanto-kulturo. Gravan rolon ludis la konatiĝo kun diversaj instrumentoj, didaktiko kaj instru-praktiko, kun aparta atento al andragogio, specifajoj por instrui plenkreskulojn, pensiulojn, kiuj ankoraŭ ŝatus, povus kleriĝi, akiri novajn sciojn.

La instruado uzis kiel bazan fadenon la 'Manlibron pri instruado de Esperanto' kaj metis en la fokuson la instrumentodon, instrumaterialon ellaboritan de Stano Marček. Estis avantaĝe, ke la lernolibro 'Esperanto per rekta metodo' estas akirebla en multaj naciaj lingvoj, kun kompleta instrupakaĵo, bildkartoj kaj KD-oj.



Kursanoj konatiĝas kun libroj, instrumaterialoj

La organizado, fakan programon enkadre de la Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia (TORPEDO) prizorgis gvidantoj de ICH: Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, projektpartneroj respondecaj pri la klerigado. Multaj famaj prelegantoj, metodikistoj, instruistoj, konataj fakuloj el la Esperantomovado (Stefan MacGill, Katalin Kováts, Lidia Ligeza, Stanislaw Mandrak, Gerald Tucker, Jevgenij Gaus, Petro Baláz) venis por instrui, prezenti, gvidi la seminariojn.

Ĉiuj planitaj celoj estis atingitaj dum tiu trejnsesio, la intensa lernado bonege preparis ĉiujn al la sekvaj fazoj. La kunestado, kunlernado de la partneroj okazis en bonega atmosfero, tre amika partnerecilito, kiu eĉ intensiviĝis, profundiĝis dum la dujara periodo.

La vizito al la Esperanto-urbo, la konatiĝo kun la laboro de ICH, rigardado de la multaj E-rilataj lokoj kaj objektoj en la urbo plifortigis la sentojn, ke valoras la peno, indas la regula kaj kompetenta okupiĝo pri E-o. Tio donis novajn celojn, novajn emojn al la ĉeestantoj por altigi sian lingvan nivelon, strebi je perfektigiĝo.

3) La daŭrigo

Al la projekto apartenis ankaŭ vasta informado, publika prezentado de la celoj, la aktivaĵoj kaj la rezultoj de la internacia kunlaboro. La reprezentantoj de la tri projektpartneroj kunvenis en Nowy Sącz, PL, por akordigi farenadaĵojn, decidi pri la detala programo de la dujara projekto.

Ili reprezentiviĝis ĉe la 19-a Monda Ekonomia Forumo en Krynica-Zdrój kaj ĉeestis en la konferenco de la Universitato de la Tria Aĝo, kie ili starigis informtablon kun multaj Esperanto-eldonaĵoj, libroj, broŝuroj, varbiloj kaj prezentis la strukturon de la dujara kunlaboro. Pri la projekto, pri la unuaj bonaj rezultoj Halina Komar (PEA) raportis en la jubilea Zamenhof-festo en Berlino en decembro 2009. Al la dissemado de informoj bone kontribuis ankaŭ pluraj gazetartikoloj ne nur en la Esperanto-gazetaro sed ankaŭ en nacilingvaj gazetoj.

Inter 22-29 majo 2010 en la pola vilaĝo **Rytro, apud Nowy Sącz**, estis organizita intensa lingvokurso sub gvido de Katalin Kováts (*edukado.net*) por plua lingva perfektigo de la projekt-partoprenantoj kaj por prepari ilin al la internaciaj lingvoekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). La tutsemajna trejnado funkciis ankaŭ kiel modelo por efika lingvoinstruado, por bone elektitaj metodoj, didaktikaj helpiloj.

La kursmaterialo inkluzivis ankaŭ metodikajn partojn kaj pro tio servis kiel daŭrigo al la komencita trejnado, kiun la grupo ricevis en oktobro 2009 en

Herzberg. Ĉi-foje estis pli detale traktataj la gramatika-traduka, situaci-komunika kaj la rekta metodoj.

Grandan rolon ludis tie ankaŭ E@I, kies fakuloj kun gvido de Peter Baláž instruis la uzadon de komputilo por lingvo-lernado kaj instruado, klarigis la utiligon de teknikajoj kaj de la interreto, prezentis la retajn kursojn de lernu.net, la enhavan buntecon kaj valoraĵojn de *edukado.net* kaj konsilis ankaŭ pri efika reklamo, varbado por kursoj, por Esperanto. Jen, estis plenumita tio, kio staris en la projekto: ni trejnu ankaŭ multobligontojn, kursgvidontojn, klubestrojn. En junio 2010 estis grava limdato: la t.n. duontempa raporto devis esti sendita al la naciaj klerigcentroj, respondeculoj pri Grundtvig-projektoj. Temis pri preparado de dokumentoj kaj alŝuto de materialoj al komuna interreta prezentejo, paĝaro de Komuna Eŭropa Trezorejo [*European Shared Treasure*], kie estas kolektitaj detaloj pri la ĝis tiam plenumitaj taskoj, partaj rezultoj, akiritaj spertoj, atingajoj.

4) La fino

Post kunvenoj en Germanio kaj Pollando la partoprenantoj el la tri partneraj landoj povis spertiĝi en unu-semajna intensa kurso dum Somera Esperanto-Studado (SES, 2-9.07.2010) en **Piešťany, Slovakio**. Ili plibonigis siajn lingvajn kapablojn en diversnivelaĵ lingvokursoj kaj spertiĝis en novaj cirkonstancoj pri kursorganizado respektive instrumentadoj.

Denove ĉiuj tri projektpartneroj aktive kunlaboris: pri la organizado zorgis Peter Baláž, rektmetodan kurson gvidis Stano Marček (ambaŭ el Slovakio), preparkursojn al la UEA/ITK-ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenc-kadro (KER) gvidis Peter Zilvar (nivelo B1) kaj Zsófia Kóródy (niveloj B2 kaj C1) de Interkultura Centro Herzberg el Germanio. Estas ĝojige, ke el inter la trejnitaj jam meze de la dujara projektperiodo sukcese trapasis la KER-ekzamenojn 4 kandidatoj en la nivelo B1, 6 en B2 kaj 10 en C1.

En la Forumo de la Universitato de la Tria Aĝo (septembro 2010, Nowy Sącz, PL) Zsófia Kóródy kun Halina Komar prezentis al centoj da delegitoj la tre sukcesan trilandan Grundtvig-projekton „Esperanto 55+”, detale rakontis pri la efika kunlaboro kaj pri la bonaj rezultoj. La vizito de Zsófia al Nowy Sącz ebligis ankaŭ la personan, oficialan transdonon de la kvarlingvaj, prestiĝaj KER-lingvoatestiloj al la sukcesintoj.

La lasta grava internacia evento por la projektmembroj estis la multflanka renkontiĝo en Nowy Sącz inter 30.04. kaj 07.05.2011: Zsófia Kóródy (DE), kiu alvenis kun du Grundtvig-kursoj, rakontis pri ILEI, pri kursoj, ekzamenoj kaj projektoj en Herzberg, Peter Baláž kaj Stano Marček (SK)

kontribuis al la programo de la Tutpollanda Esperanto-Kongreso per fakprelegoj, prezentadoj. Memorinda travivaĵo estis por ĉiuj tri partneroj la partopreno en la granda surstrata urba festo dum la Eŭropa Tago. Ili utiligis la eventon ankaŭ por organiza laborkunveno kaj por preparoli la finraportadon pri la Grundtvig-projekto, kiu laŭ la postuloj de la naciaj agentejoj devis esti preta ĝis la fino de septembro.

La fina raporto enhavis ĉiujn detalojn pri la internaciaj renkontiĝoj, vizitoj al partnerinstitucioj, klerigsesioj, pretigitaj filmoj, intervjuoj, aperintaj gazetartikoloj, fotoalbumoj, bildoj ktp. Ĉiuj partneroj aparte devis prizorgi sian propran dokumentadon kaj ili devis ankaŭ raporti pri la komunaj atingajoj. Kiel ĉefaj projektproduktoj estis redaktitaj kvar-lingva interreta prezentejo (*eo55.ikso.net* fare de Katarina Nosková, E@I) kaj same kvarlingva 8-paĝa broŝuro (Grundtvig Partnera Projekto 2009-2011 fare de Zsófia Kóródy, ICH). Inter la bonaj rezultoj de la trilanda kunlaboro estis la regulaj dialogoj ene de la partnereco. La Grundtvig-partneroj povas fieri: ili ne nur plenumis ĉion, sed superis la atendeblajn rezultojn. Ne temas nur pri la lingva perfektigo, trapasitaj ekzamenoj sed ankaŭ pri faka evoluo. Kelkaj partoprenintoj jam memstare organizas E-eventojn, klubkunvenojn, gvidas E-kursojn, instruas en lernejo. Multaj daŭrigas la kontaktojn unu kun la aliaj, ĉu grupe, ĉu individue, ĉefe danke al modernaj komunikad-programoj en la interreto. Por la sekva Somera E-Studado en Nitra, SK, fine de julio 2011, la polaj partneroj preparis kulturprogramon kaj kiel bela krono por interamikiĝo estas konsiderebla la denova vizito al Herzberg am Harz, survoje al kulturvojaĝo al la Eŭropa Parlamento en Bruselo.

Resume: ni esperas, ke kelkaj E-asocioj, institucioj sekvos nian modelon, utiligos niajn spertojn. Nepre rekomendinde la partopreno en Grundtvig-projekto. Por pluaj informoj, konsiloj, helpo vi povas turni vin al la projektgvidintoj per la hejmpaĝo <http://eo55.ikso.net>.

Por via notlibro

Venontaj sesioj de Internaciaj Ekzamenoj de ILEI / UEA

- Julio 2012: Kunming, Ĉinio, kadre de ILEI-konferenco (nivelejo: „elementa” kaj „meza”).
- 10-11 novembro 2012: Kotonu, Benino (kulturcentro CODIAM) kadre de kursaro okazigota de NRO „Scio Sen Bariloj” (nivelejo: „unua kontakto” kaj „elementa”).

- Decembro 2012: Dakaro aŭ Thiés, Senegalio, kadre de kurso okazigota de NRO „Scio Sen Bariloj” (elementa nivelo).
- Esplorata plia sesio: Nepalo, aŭgusto 2012

Mireille GROSJEAN (mirejo.mireille@gmail.com)

Kurso fervojista ricevas verdan lumon

ILEI starigas kunlaboron kun IFEF (la Internacia Fervojista E-Federacio), kadre de ties 64a Kongreso okazanta en Herzberg, la E-urbo, inter la 19a kaj 25a de majo, 2012. Post novjaraj traktoj, estas konsentite, ke ILEI organizos nov-specan programeron – naŭ-sesian seminarion pri la arto instrui E-on en fervojistaj rondoj. Ĝi celas instruistojn kaj kursgvidantojn (aŭ -ontojn), ne nepre fervojistajn. Ĝi prezentos novan didaktikan ŝtuparon, surbaze de la unikaj bezonoj kaj potencialoj de la lingvo mem; tio estas uzi verbocentran aliron, kun forta atento al la (ne)transitiveco. Seminarianoj trastudos skemon por kreata kurso kun vigla kaj fervojista enhavo, kun didaktika ŝtuparo modifita de la paralele pretigata jubilea kurso. Partoprenontoj interŝanĝos instruspertojn, diskutos jubileajn varbagojn, kaj ricevos tasketon prepari en paroj kvin-minutajn modellecionojn. La tri-taga kurso laŭplane komenciĝos sabate, la 19an de majo, ekde la 15a horo (2 sesioj), kun tri pliaj horoj dimanĉe kaj kvar lunde. Ĝin gvidos la prezidanto de ILEI, Stefan MacGill. La kosto por la seminario kaj ĝiaj presitaj materialoj estos 10 eŭroj por aliĝintoj al la IFEF-kongreso kaj 20 eŭroj por nealiĝintoj, pageblaj surloke. Atestilojn pri partopreno ni disdonos. La seminaria programo kaj superrigardo de la etapoj de la fervoja kurso estas troveblaj en la retejoj de ILEI kaj la Kongreso: <http://ifk64.esperanto-urbo.de> (maldekstra menuo). (smg)

La 1-a kunsido de Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ĈLEI)

La 25-an de decembro 2011 okazis kunsido de la ĈLEI en la 9-a Ĉina Kongreso de E-o, en kiu partoprenis pli ol 50 personoj. S-ino Gong Xiaofeng, prezidantino de ĈLEI, prezidis la kunsidon. Fakte tio estas la unua kunsido de ĈLEI post ĝia fondiĝo en la jarmezo. S-ino Gong Xiaofeng dividis la laborojn de la estraranoj kaj kreis la laborplanon. Laŭ la plano ĈLEI okazigos siajn seminariojn paralele kun lokaj kongresoj. Ĝi daŭre organizos la trejnadojn en vintra kaj somera ferioj kaj helpos al universitatoj malfermi E-kursojn. Por efike altigi la lingvonivelon kaj reguligi la E-lernigadon en la lando ĈLEI planas starigi ekzamenan

sistemon de Ĉinio, kiu konsultos la ekzamenan sistemon de ILEI konsiderante la ĉinan realon. S-ino Gong emfazis la reguligon de lerniloj. Ŝi diris, ke nun al ĉinaj mezlernejoj mankas E-lernolibroj, ĈLEI faros laboron en tiu flanko. Ŝi esprimis, ke ĈLEI havas respondecon en internaciaj kulturaj interŝanĝoj. En la sekvaj jaroj ĈLEI helpos al universitatoj kaj divers-nivelaj lernejoj starigi ĝemelajn lernejojn pri E-o por doni al ili pli da ŝancoj uzi la lingvon. En la diskutado de la kunsido multaj ĉeestantoj prezentis la E-lernigadon de sia loko kaj deziras, ke ĈLEI bone ludu sian rolon en E-lernigado. La kunsido decidis, ke ĈLEI regule redaktos kaj dissendos sian bultenon al la membroj por interŝanĝi E-lernigajn informojn ĉinajn kaj internaciajn. *(laŭ raporto de Chen Ji)*

Festlibro pri Helmar Frank

Okaze de la okdekjarigo de Prof. Helmar FRANK, la Akademia Libroservo Paderborn planas eldoni festlibron. Oni povas kontribui per sciencaj artikoloj (ĉiuj temoj, laŭ fakoj de AIS: kibernetiko, humanistiko, struktursciencoj, filozofio, natursciencoj, morfosciencoj) aŭ per financa subteno. Pri limdatoj kaj detaloj demandu s-inon Vera Barandovská-Frank (vera.barandovska@uni-paderborn.de) aŭ elŝutu la PDF-dosieron de http://www.ais-sanmarino.org/publik/oma%C4%9Dlibro_frank80/Letero%20Festschrift%20Frank.pdf.

Somera ILEI-Kursaro en Germanio

2x1-semajna, 125-hora intensa lingvoperfektiga kaj instrukapabla trejnado en Herzberg am Harz – la E-urbo, akireblo de ILEI-diplomo. Nova modula varianto de la unu-jara ILEI-UAM klerigprogramo kun la fakoj: gramatiko, interlingvistiko, literaturo, historio, lingvopedagogio, metodiko, E-kulturo. Aldoniĝas temoj pri movada informado, organizado, varbado, gazetara laboro, interkultura komunikado. Kaj distraj programeroj, ekskursoj!

DATO: 13-20.07.2012 intensa lingvo-perfektiga fazo, modularo I.

20-28.07.2012 pedagogia-metodika fazo, modularo II.

KOTIZOJ: 125 kurshoroj por 125 €=1 instruhoro por 1 € aŭ eĉ malpli!

por 1 semajno/2 semajnoj	A-landoj	B-landoj
ĝis 30.04.212	65/ 125	45/80
post 30.04.2012	80/140	65/ 125

Detaloj ĉe <http://esperanto-urbo.de> (*Kursoj, klerigado*)

ALIĜO: Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, Zsófia Kóródy, estrarano de ILEI por edukcentroj, ekzamenoj kaj instrukapabligo: zsofia.korody@esperanto.de.

Kongreso de Federacio Internacia de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj

FIPLV (*Federacion Internationale de Professeurs de Langues Vivante*) anoncas la okazigon de sia sekva Monda Kongreso en Helsinko, Finnlando en la 8a kaj 9a de junio 2012. Tiu evento okazas nur ĉiun trian jaron. ILEI rilatas kun sia finna sekcio pri partopreno; dezirinde estas, ke ILEI-anoj proponu referaĵojn por la Kongreso; sekvos informoj kiel fari tion. Detaloj ĉe: www.sukol.fi/fiplv2012.

Reago

Estimata S-ino Anna-Liisa Ali-Simola,

Atente mi legis en IPR 11/4, p.19, vian vidpunkton pri la bezono de reklamado por Esperanto. Vi ja pravas skribante, ke la celo de artikolo aŭ de reklamo estas allogi legantojn por lerni E-on. Sed la problemo estas trovi taŭgajn informojn, taŭgajn argumentojn por vekti ian intereson ĉe legantoj. Ĉu fakte, kiom da legantoj de la franca tagĵurnalo *Le Monde* legis tiun tutpaĝan reklamon, kiun pagis S-ro Etsuo Miyoshi? Tre malmultaj! Mi ja havis okazon legi tiun tekston antaŭ ĝia aperigo, ĉar S-ro Miyoshi mem sendis ĝin al mi. Kaj mi sciigis al li mian dubon tiurilate.

Mi havas la impreson, ke tro ofte e-istoj forgesas, ke por iel allogi, lingvo estu nepre utiligebla por plej diversaj celoj, ĉefe por fakaj, profesiaj, komercaj celoj. Bedaŭrinde, ĝis nun, E-o estas apenaŭ, aŭ eĉ tute ne uzata por tiaj celoj. Niaj fakaj asocioj estas ĝenerale nur surpaperaĵoj sen iu ajn vera utileco. Eble mi eraras, sed mi havas la impreson ke en E-medioj oni ĉefe ade babiladas nur pri Esperanto mem kaj pri la Majstro, forgesante ke ni ne plu vivas en la fino de la 19-a sed en la 21-a jarcento!

Neniam E-o allogos vastan publikon pro relativa facileco; krome ĝi ja ne estas tiom facila, kiel ĉiutage pravas la senfinaj komencantoj kaj la „saluton-ĝis-revid-uloj”! Pro tio mi havas egan admiron por personoj kiel Prof. D-ro Helmar Frank, kiu fondis AIS-n (Akademio Internacia de la

Sciencoj) kies celo estis uzi E-on fakcele kun kaj apud aliaj lingvoj <<http://www.ais-sanmarino.org/>>; ni bedaŭru, ke ĝia aktiveco nun lamas post la malsaniĝo de ĝia ĉefa fondinto! Same mi bondeziras sukcesegon al S-ro Dennis Keefe por liaj admirindaj projektoj E-Insulo kaj E-Universitato <<http://www.esperanto-insulo.info/>>!

Reklamado nepras, ja, sed tio ne signifas, ke aŭtomate multaj homoj interesiĝos pri la lingvo... se ne eblas uzi ĝin utile kaj ne nur movadcele! Dum 8 jaroj – de januaro 1980 ĝis decembro 1987 – mi verkis monate 50-liniajn kronikojn pri E-o en la belga tagĵurnalo *La Dernière Heure* [la lasta horo], eldonita en 120.000 ekzempleroj. Gravega problemoj kaj malfacila tasko por mi estis trovi novan temon ĉiumonate (sume 96), ĉefe pri aplikado de la lingvo! Konkreta rezulto estis, ke pluraj personoj miris pro la fakto, ke E-o ankoraŭ vivis; eble kelkaj iom pli informiĝis pri tiu lingvo, pri kiu ili povis legi ĉiumonate. Sed mi konas neniu kiu, pro mia kroniko, eklernis E-on kaj aniĝis al belga E-asocio aŭ loka E-grupo. Eble mi estas malbonega reklamisto... Konklude: E-o bezonas reklamadon, ja, sed ankaŭ kaj ĉefe utilajn aplikadojn!

Kore via: Germain PIRLOT

La Dua Komunikado de la 45-a Konferenco de ILEI Kunming, 20-26 julio 2012

La arto de komunikado, komunikado de artoj

Konferenca laborgrupo¹ vizitis la gastiganton de la 45-a Konferenco de ILEI, Profesian Artkolegion de Kunming, inter la 28-a de novembro kaj 3-a decembro 2011, por aranĝi surlokajn kondiĉojn por la konferenco. Tiam estis subskribita kontrakto inter ILEI kaj la Artkolegio, kiu difinas ĉion

¹ Prof. d-rino GONG Xiaofeng - Arko (prezidanto de LKK, ĉina sekciestro de ILEI), S-ro PENG Zhengming - Trigo (LKK-ano, prezidanto de Hubei-a E-Asocio) kaj s-ro Radojica Petrović (ILEI-estrarano pri konferencoj). Flanke de la Artkolegio la grupon gastigis Prof. DUAN Yongxin (kolegiestro, vicprezidanto de nia LKK) kun siaj kunlaborantoj, inter kiuj S-ro ZHANG Lianjin (konsiliano de Yunnan-a E-asocio, nia LKK-ano, gvidanto de E-kurso por studentoj de la Artkolegio prepare por la konferenco)

bezonatan por la normala laboro de la konferenco kaj agrabla septaga restado de la konferencanoj en domoj de la Artkolegio, situanta apud la lago Dian Chi. Ni ankaŭ komencis negoci kun turisma agentejo pri turisma programo por la konferenco kaj transporto al la UK en Hanojo post la konferenco, ni klarigis niajn bezonojn, diskutis pri komenca oferto kaj nun ni atendas la definitivan oferton.

Konferencejo

Prelegsalonoj, kunvenejoj, koncertejoj, dormoĉambroj kaj manĝejoj – ĉio troviĝas ene de la Artkolegio, je kelkminuta promendistanco. La prelegejoj estas ekipitaj per komputilaj projekciiloj kaj ordinaraj murtabuloj. La solenaj malfermo kaj fermo, bonveniga kaj adiaŭa vesperoj kaj kelkaj aliaj programeroj okazos en la koncertejoj. Dum la tuta semajno la konferencanoj havos je dispono senpagan retekonekton.



Loĝado kaj manĝoj

La interna hotelo de la kolegio certigas la bezonatan komforton por la konferencanoj en dultaj kaj trilitaj ĉambroj kun: banĉambro kaj necesejo en ĉiu ĉambro, littukoj, bantuko kaj mantuko, televidilo, varma akvo inter la 7-a kaj 10-a horoj matene kaj 19-a kaj 24-a horoj vespere. Eblas mendi dultan ĉambrojn por unu persono. Matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo estos disponigataj memserve en restoracio de la Artkolegio kaj konsistos el 20 pladoj, inter kiuj pluraj estos vegetaraj. Konferencanoj ne kutimiĝintaj al manĝbastonetoj bonvolu kunporti sian forkon kaj tranĉilon. **Prezj por unu persono por tranoktado kun tri manĝoj tage**, ekde tagmanĝo la 20an ĝis matenmanĝo la 27an de julio:

- En tripersona ĉambro: por unu nokto 20 €, por 7 noktoj 140 €,
- En dupersona ĉambro: por unu nokto 25 €, por 7 noktoj 175 €,
- En unupersona ĉambro: por unu nokto 35 €, por 7 noktoj 245 €.

Bv. mendi retmesaĝe aŭ paperletere al la estrarano pri konferencoj indikante: la tipon de la ĉambro, datojn por kiuj vi mendas, kaj pagendan

sumon. Bonvolu pagi laŭ unu el la manieroj indikitaj en la aliĝilo (IPR 11/4 p. 39 kaj <http://ilei.info/novajxoj/45Konf-alighilo.pdf>).

Por pli luksa loĝado, ni atendas hoteloferon de la turisma agentejo, por subskribi kun ĝi prian kontrakton.

Transporto

Ĉe alveno kaj foriro, la Artkolegio proponos senpagan transporton de konferencanoj inter la flughaveno de Kunming kaj la conferencejo.

Transporto el Kunming al Hanojo por UK estos organizita buse kaj trajne por tiuj kiuj ne volos flugi tien pro multekosta flugbileto. Ni atendas definitivan oferton de la turisma agentejo kun itineraĵoj kaj prezaj detaloj. Ĉiukaze, la 27an de julio post la matenmanĝo la grupo busos el Kunming ĝis la stacidomo en la vjetnama landlima urbo LaoCai. La busveturo daŭras pli-malpli 8 horojn kun sufiĉaj paŭzoj por tagmanĝo kaj aliaj bezonoj. Poste oni daŭrigos per nokta trajno por atingi Hanojon la 28an de julio matene. Inversdirekta reveno per trajno kaj buso estos organizita por tiuj kiuj post UK revenos al Ĉinio, aŭ hejmen tra Ĉinio. Ne forgesu havigi vjetnaman vizon se ĝi estas postulata por vizitantoj el la lando.

Por uzado de la urba trafiko en Kunming mem ni ankoraŭ donos la informojn pri trafiklinioj, taksioj kaj prezoj.

Konferenca programo

Sekvante sian tradician skemon de faka-kleriga, labora-organiza kaj kultura-distra fadenoj, la konferenca programo ankaŭ adaptiĝos al la specifaj bezonoj de la regiona E-movado kaj ILEI-agado en Orienta Azio. La *2-a ISOA* (ILEI-Seminario en Orienta Azio) okazos enkadre de la konferenca programo la 22an de julio 2012, en formo de prelegoj, forumoj kaj laborgrupoj pri E-metodikaj specifajoj kaj problemaro en Orienta Azio, daŭrigante kaj plikonkretigante la diskutojn lanĉitajn per la pasintjara *1-a ISOA*. Alternativaj programeroj estos proponitaj al tiuj kiuj ne interŝiĝos pri ISOA. Kelkaj unuaj aliĝintoj jam proponis siajn programkontribuojn. Ĉiuj konferencanoj estas petataj proponi siajn kontribuojn, precipe por la *Interkona frandvespero*, *Internacia vespero* kaj *Lingva festivalo*, sed ankaŭ por aliaj programpartoj laŭ la programskemo prezentita en la Unua Komunikado (IPR 11/4 p. 34-40 kaj <http://ilei.info/novajxoj/45Konf-alighilo.pdf>). Altkvalitan kaj kulture riĉan programon ni ĝuos en la bonveniga kaj adiaŭa vesperoj, prezentotan de studentoj de la Artkolegio,

ontaj profesiaj muzikistoj, dancistoj kaj scenejartistoj venantaj el pli ol trideko da ĉinaj etnoj kaj plimulto de ĉinaj provincoj. Ankaŭ la *Lingva festivalo* ebligas al la konferencanoj konatiĝi, almenaŭ specimene, kun la lingva kaj kultura diverseco de Ĉinio paralele kun lingvoj de eksterĉinaj konferencanoj.



Ekskursoj

La ĉirkaŭaĵo de Kunming estas regiono turisme alloga pro siaj naturaj vidindaĵoj kaj kultura bunto. La turisma agentejo, kiun ni kontaktis, ofertas tuttagajn kaj duontagajn ekskursojn al la fama *Ŝtona arbaro* [vd *supre*], aŭ etno-vilaĝo, aŭ ornamriĉaj grotoj, aŭ aliaj vizitindaĵoj ekster kaj en Kunming, inkluzive de marĉandvizitoj al la urba bazaro. Por ebligi al konferencanoj ĝui pliajn ekskursojn, anstataŭ en ununura ekskursita tago, ni kombinos ilin kun ceteraj konferencaj programeroj en diversaj tagoj por laŭplaĉa elekto. Do, oni povas aliĝi al la konferenco tuj, kaj mendi ekskursojn kaj aliajn servojn kiam la kompleta oferto estos publikigita en la retpaĝaro de ILEI kaj alimaniere. Al jamaj aliĝintoj la oferto estos rekte komunikita.

Kunming invitas vin: venu kaj partoprenu, lernu kaj lernigu, ĝuu kaj ĝuigu – laŭ la tradicia etoso de ILEI-konferencoj kaj nova elano de ILEI en Orienta Azio.

Viajn aliĝilojn, mendojn, kontribuproponojn, aliĝojn al internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA, demandojn kaj rimarkojn bonvolu sendi retroŝte aŭ papere al la estrarano pri konferencoj (la adresoj troveblas sur la dua kovrilpaĝo). La unua aliĝperiodo kun la plej malaltaj kotizoj finiĝas la 31an de marto 2012. Por konferencanoj el Ĉinio validas kotizoj kaj prezoj en CNY. Ili bonvolu turni sin al la ĉina sekciestro de ILEI, prof. d-rino GONG Xiaofeng - Arko (arko.gong@qq.com) kaj pagi enlande.

Radojica PETROVIĆ

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Reza Torabi (sekretario), Karine Arakelian, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekō Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrola: Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot.

Lerneja: Julián Hernández (gvid.), Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tiekō Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Beloŝević, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill).

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: Radojica Petrović).

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Aida Ĉiĝkaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat.

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vít'azná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net.
Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondajo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono:
Zsófia Kóródy, zsafia.korody@esperanto.de.

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Stefan MacGill**.

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto kaj A-komitato de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

UN (Unuiĝintaj Nacioj): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek**, **R. Glossop**, **L. Biró**.

UNESKO (en neformalaj rilatoj): Rerezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr; **Monique Arnaud**, Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino) **kaj 10 € en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 10 € por la A-landoj kaj 5 € por la B-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la fondoĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Julija BATRAKOVA, p/a Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, <persiko@mail.ru>.

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldone de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*), pike-b (projekto *Interkulturo*).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 20 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem. Presado*: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel. (+32-3)-234 34 00. Redaktejo*: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5, <jozefo.nemeth@gmail.com>, http://www.ilei.info/ipr/; tel. (+36-89) 356-050.*

La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, <moerbeekr@gmail.com>.*

**La nunan numeron ni sendis al la presejo 20 februaro 2012,
redaktofino por la sekva numero 15 aprilo 2012.**

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Vasil Pistoli,
c/o Bardhyl Selimi,
Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3,
AL-1016 Tirana,
selimibardhyl@yahoo.com

Aŭstralio: Jennifer Bishop,
24/8 Wallen Rd, Hawthorn,
AU-3122 Victoria,
bishop.jennifer699@gmail.com

Belgio: Marc Cuffez,
Elisabethlaan 295,
BE-8400 Oostende,
marc.cuffez@telenet.be

Benino: François
Hounsounou,
BP 226, BJ-Lokossa-Mono,
hounfranc@yahoo.fr

Brazilo: Leysester Miró,
rua Jorge Tiburcia 592, Vila
Mariana,
BR-041-26001 Sao Paulo (SP)
leysester@gmail.com

Burundo: Jérémie
Sabiymumva,
BP 170, Rumonge-Burundi,
ane_bur@yahoo.fr

SEKCIJOJ (daŭrigo)

Ĉeĥio: Jana Melichárková, Polní 938, CZ-696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz

Ĉinio: Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, arko.gong@qq.com

Danio: Bent Jensenius Højstrupvej 124, DK-2700 Brønshøj, bentjensenius@gmail.com

Finnlando: Sylvia Hämäläinen F.E. Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, sylvia.h@kolumbus.fi

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la Crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia Kóródy, E-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, zsofta.korody@esperanto.de

Hungario: József Németh, *vidu sur p. 41.*

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, silkovojo@aliceposta.it

Japanio: Isikawa Tiekō, Tate 1-6-6-103, JP-353-0006 Siki-si, Saitama-ken, isksanjo@offe-mansion.com

Katalunio: Pedro M. Martín Arnau Gatell 2, ES-17300 Blanes, ileicat@hotmail.com

Korea Resp.: LEE Jung-kee, Moklyun Usong Apt. 307-707, Bomke-dong, Dongan-ku, Amyang-si, Kyungki-do, KR-431-070, esperanto@saluton.net

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, ilei@hes-keu.hr

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Kuba E-Asocio, Apartado 5120, CU-10500 La Habana, Cuba, info@esperanto.co.cu

Meksiko: Carlos Hernández Loarca Arco del Triunfo 2019-40 San Pedrito los Arcos, MX 76148 Querétaro México, ilei@esperanto-mexico.org

Nederlando: Robert Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, moerbeekr@gmail.com

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarefaret 8A, NO-4340 Bryne, akbondhus@jkn.no

Pollando: Tomasz Chmielik, ul. Jarzębinowa 3/33, PL-21-040 Świdnik, tchmj@wp.pl

Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principală, Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, mihaitrifoi@yahoo.com

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, RS-32000 Čačak, radojica.petrovic.rs@gmail.com

Svedio: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Katrineholm, agi.emanuelsson@telia.com

Svislando: Mireille Grosjean, Grand-rue 9. Case postale 9, CH-2416 Les Brenets, mirejoe.mireille@gmail.com

Togolando: Attigbe-Agbemadon B., Mensah, T.I.E.To, B.P. 13169, Lomé-Togo, esp.togo@cafe.tg

Ukrainio: Volodimir Hordijenko, p/k35, Kijiv-133, UA-01133 volodimir@ukr.net

Usono kaj Kanado: Ronald Glossop, 8894 Berkay Avenue, US-63136-5004 Jennings, MO rglossop@mindspring.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, Lidaelb@yahoo.com

Barato/Hinda Unio: Venkatesh Reddy, No. 216, Off Main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, esperovr@yahoo.co.in

Bulgario: Mariana Gencheva, Targovska 95, BG-5180 Polski Trambesh, maries972@yahoo.com

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, hecg@uea.org

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, lofturmsg@yahoo.de

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490

Givatatjim, saviogp@zahav.net.il
Kongo DR: Viktor Lukolama Lufimpu, c/o Mampuya Diakiese, B.P. 7598, CILU, Kinshasa 1, kekcd@yahoo.fr

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, gwenda.s@ihug.co.nz

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taškento, CIS, esperuzo@mail.ru

KONTAKTPERSONOJ

Bolivio: Leandra Dia Rios, Calle Maria Estiváriz No 290, Avenida Coronel Valdez Pasaje Zaratustra, Villa Pabón, Zona Central, mileis_7@hotmail.com

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Haitio: Christine Theano, Christ-Roi, Imp. Romane # 41, HT-6110 Port-au-Prince, christinetheano@hotmail.com

Indonezio: Ilia Sumiltia Dewi, Perumahan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, Bekasi, Jawa Barat, ilia.dewi@gmail.com

Kenjo: Gilbert S. Sikala, Chemomi Estate, P.o. Box 22, 30301, Nandi Hills, Kenya, simiyugilbert@yahoo.com

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, tikoguau@gmail.com

Litovio: vakas

Nepalo: Bharat Kumar Ghimiere, Nepala Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, nespa_bharat@hotmail.com

Urugvajio: Sonia Risso, Pascual Costa 3253 Apto 1215, UY-11700 Montevideo, sonry@adinet.com.uy



Grupo de la 3-landa Grundtvig-projekto en SES, Piešťany, Slovakio (vd p.27)



La finfarintoj de la instruista trejnado kun siaj instruistoj en Poznano (vd p.24)

